

# La sep vojaĝoj de Sindbad la maristo

el *Mil kaj unu noktoj*

Daniel Moirand tradukis

## Antoine Galland (1646–1715)

Tiu Franco estis spertulo pri la araba, turka kaj persa lingvoj. En la XVII-a jarcento, li laboris en la franca ambasadejo de Konstantinopolo en la Otomana imperio, nuna Turkio, kiel tradukisto. Dum unu el siaj promenadoj tra la bazaro/bezestano de tiu urbo, li trafis faskon da arabaj manuskriptoj, kiujn li aĉetis. Tiuj skribaĵoj rakontis la aventurojn de iu aŭdaca araba komercisto, okaze de pluraj surmaraj vojaĝoj. Galland ĵus malkovris parton de tio, kio poste famiĝos sub la nomo: *la Libro de la Mil kaj unu Noktoj*.

Li komencas traduki la vojaĝojn de Sindbad, sed baldaŭ konscias, ke ili estas nur parto de pli ampleksa kolekto da rakontoj. Danke al siaj propraj eltrovoj kaj al novaj manuskriptoj, kiujn oni sendas al li el Turkio kaj el Alepo, li baldaŭ havas en sia posedo la pli grandan parton de tiuj arabaj rakontoj.

Li regule tradukas kaj eldonas la rezulton de sia laboro, tiel ke en 1702 aperas la du unuaj volumoj de lia traduko de la *Libro de la Mil kaj unu Noktoj – arabaj rakontoj*. La du lastaj volumoj de la unua eldono aperos en 1717, do du jarojn post lia morto.

La libro tuj ĝuis grandegan sukceson: orienta furoro disvastiĝis tra tuta Eŭropo. Oni senhonte kopiis, tradukis kaj plagiatis la tradukon de A. Galland. Tiuj rakontoj treege diferenciĝis de la kutimaj kaj klasikaj mezepokaj rakontoj. La influo de tiuj orientaj rakontoj tuj influis la tiaman literaturon muzikon, pentran arton, ... Tiu fascino daŭre evidentiĝas ĝis nun en filmoarto (Pasolini kaj aliaj)!

## La temo

Laŭ la legendo, sultano Ŝahriar por venĝi sin kontraŭ malfidela edzino, decidas ĉiun nokton akiri novan edzinon. Post la nupta nokto li ordonas mortigi tiun portempan edzinon. La sistemo daŭras dum sufiĉe longa tempo, kiam la unuenaskita filino de lia veziro, Ŝehrazad (kun la helpo de la fratino Dinarzad), decidas proponi sin kiel novan, ununoktan edzinon por trovi solvon kaj ĉesigi tiun situacion. Do, tuj post la matena vekiĝo, ŝi komencas rakonti al la sultano pasiigan historion. Ŝi aranĝas sian rakonton, por ke ties fino ne okazu antaŭ la ektagiĝo. Tiamaniere, ŝi kaptas la intereson de la sultano, kiu, por koni la lastan parton de la rakonto, lasas ŝin pluvivi ĝis la posta nokto. Tiu stratagemo disvolviĝas de nokto al nokto, ĝis

la fino de la 1001-a, kiam la sultano decidis konservi la vivon de Ŝeherazad kaj fari el ŝi sian edzinon.

Pro tio, la rakonto estas disdividita laŭ la sinsekvo de mil kaj unu noktoj.

Jen do alnavigas Sindbad la maristo, hisu la velojn kaj akriĝu viajn okulojn :

## Rakonto de Sindbad la maristo

– Senjoro, dum la reĝado de tiu sama kalifo Harun-al-Raŝido, pri kiu mi ĵus parolis, vivis en Bagdado malriĉa portisto, kiu nomiĝis Hindbad. Iun tagon, kiam estis ekscesa varmo, li portis tre pezan ŝarĝon de unu ekstremo de la urbo al la alia. Ĉar li estis tre laca pro la vojo, kiun li jam iris, kaj ĉar restis al li ankoraŭ multon por paŝi, li atingis straton, kie regis milda zefiro, kaj kie la pavimo estis akvumita per roza akvo. Ĉar li ne povis deziri pli taŭgan lokon por ripozi kaj akiri novajn fortojn, li terenmetis sian ŝarĝon kaj sidiĝis sur ĝin, apud vasta domo.

Li baldaŭ estis tre kontenta, ke li haltis en tiu loko, ĉar lia flaro estis agrable trafata de la delicaodoro de aloa ligno kaj de kukoj, kiu eliris el la fenestroj de tiu domo, kaj kiu miksiĝante kun laodoro de la roza akvo, fajne aromis la aeron. Krom tio, li aŭdis en la domo koncerton de diversaj muzikinstrumentoj akompanataj de la harmonia kantado de granda nombro da najtingaloj kaj da aliaj birdoj specifaj al la klimato de Bagdado. Tiu gracia melodio kaj la fumo de diversspecaj manĝaĵoj, kiuj bone odoris, ebligis al li kompreni, ke okazas tie iu festeno, kaj ke tie oni ĝojas. Li volis ekscii, kiu loĝas en tiu domo, kiun li ne bone konis, ĉar li malofte havis la okazon trapaŝi tiun straton. Por kontentigi sian scivolemon, li alproksimiĝis al kelkaj pompe vestitaj servistoj, kiujn li vidis apud la pordo, kaj petis de unu el ili kiel nomiĝas la mastro de tiu domo.

– Nu, kio! respondis al li la servisto, vi vivas en Bagdado, kaj vi ne scias, ke ĉi tie estas la domo de senjoro Sindbad la maristo, de tiu fama vojaĝanto, kiu tranavigis ĉiujn marojn, kiujn la suno lumigas?

La portisto, kiu aŭdis pri la riĉaĵoj de Sindbad, ne povis malhelpi sin envii viron, kies pozicio aspektis por li tiom feliĉa, kiom li taksas la sian priplorinda. Kun la menso amarigita de siaj pripensoj, li levis la okulojn al la ĉielo, kaj diris sufiĉe laŭte, por ke oni aŭdu lin:

– Potenca kreinto de ĉio, konsideru la diferencon, kiu estas inter Sindbad kaj mi; mi ĉiun tagon suferas mil lacojn kaj mil malfeliĉojn, kaj mi havas tre multe da peno por nutri min kaj mian familion, per malbona hordea pano, dum la feliĉa Sindbad malŝpare elspezas sennombrajn riĉaĵojn kaj vivas vivon plenan je delicoj. Kion li faris por ricevi de vi tiom agrablan destinton? Kion mi faris por meriti iun tiom rigoran? Findirante tiujn parolojn, li frapis per la piedo sur la teron, kiel homo komplete regata de sia doloro kaj de sia malespero.

Li ankoraŭ estis okupata de tiuj malgajaj pensoj, kiam li vidis eliri el la domo serviston, kiu venis al li kaj, prenante lin je la brako, diris al li:

– Venu, sekvu min; senjoro Sindbad, mia mastro, volas paroli kun vi.

La tago, kiu aperis en tiu momento malhelpis Ŝeherazad-on daŭrigi tiun historion; sed ŝi tiamaniere rekomencis rakonti ĝin la postan tagon:

## 70-a nokto

– Senjoro, Via Moŝto povas facile imagi, ke Hindbad estis ne malmulte surprizata de la komplimento, kiun oni faris al li. Post la paroloj, kiujn li ĵus prononcis, li havis ion por timi, ke Sindbad venigas lin por fitrakti lin; pro tio li volis senkulpiĝi, ĉar li ne povas forlasi sian ŝarĝon meze de la strato, sed la servisto de Sindbad certigis al li, ke oni zorgos pri ĝi, kaj tiom insistis pri la ordono, kiun oni donis al li, ke la portisto nepre devis obei lian peton.

La servisto enkondukis lin en vastan salonon, kie troviĝis multaj personoj ĉirkaŭ tablo kovrita per ĉiuspecaj delikataj manĝaĵoj. Eblis vidi en la honora loko respektindan personon, bele aspektantan kaj honorindan pro longa blanka barbo, kaj malantaŭ li staris multaj oficistoj kaj servistoj tre servopretaj. Tiu persono estis Sindbad. La portisto, kies konfuzo pliiĝis vidante tiom da homoj kaj tiom beligan festenon, tremante salutis la kunvenintojn. Sindbad petis lin alproksimiĝi, kaj sidiginte lin sur sian dekstran flankon, li mem proponis al li la manĝaĵojn, kaj donis al li por trinki bonegan vinon, per kiu la bufedo estis abunde provizita.

Ĉe la fino de la manĝado, Sindbad rimarkante, ke siaj invititoj ne plu manĝas, ekparolis, kaj alparolante Hindbad-on, kiun li nomis frato, laŭ la kutimo de la Araboj, kiam ili intime parolas inter si, li demandis lin, kiel li nomiĝas, kaj kiun metion li havas.

– Senjoro, li respondis, mi nomiĝas Hindbad.

– Mi estas tre kontenta vidi vin, respondis Sindbad, kaj mi certigas al vi, ke la kompanio same vidas vin kun plezuro, sed mi dezirus ekscii de vi mem tion, kion vi antaŭ nelonge diris en la strato.

Sindbad antaŭ ol ĉetabliĝi, aŭdis lian tutan paroladon tra iu fenestro, kaj ja tio instigis lin venigi tiun.

Je tiu demando, Hindbad plena je konfuzo, mallevis la kapon kaj respondis:

– Senjoro, mi konfesas, ke mia laceco donis al mi malbonan humoron, kaj ke eskapis el mia buŝo kelkaj senpripensaj paroloj, kiujn mi petegas vin pardoni.

– Ho! ne kredu, respondis Sindbad, ke mi estas sufiĉe maljusta por konservi rankoron pro tio. Mi komprenas vian situacion; anstataŭ riproĉi al vi viajn protestojn, mi plendas vin; sed mi devas elerarigi vin pri via opinio rilate min. Vi sendube imagas, ke mi senpene kaj senlabore akiris ĉiujn komforton kaj ripozon, kiujn, kiel vi vidas, mi profitas: elerariĝu. Mi atingis tiom feliĉan staton nur suferinte dum pluraj jaroj ĉiujn spiritajn kaj korpajn penojn, kiujn la menso kapablas imagi. Jes, Senjoroj, li aldonis alparolante la tutan kompanion, mi povas certigi al vi, ke tiuj penoj estas tiom eksterordinaraj, ke ili kapablas forpreni de la homoj la plej avidaj je riĉaĵoj la pereigan deziron tranavigi la marojn por akiri ilin. Vi verŝajne nur svage aŭdis

pri miaj strangaj aventuroj, kaj pri la danĝeroj, kiujn mi trafis dum la sep vojaĝoj, kiujn mi faris, kaj ĉar prezentiĝas tiu okazo, mi tuj faros al vi fidelan raporton pri ili: mi kredas, ke vi ne bedaŭros aŭdi tion.

Ĉar Sindbad deziris rakonti sian historion ĉefe pro la portisto, antaŭ ol komenci, li ordonis forporti la ŝarĝon, kiun tiu lasis en la strato, en la lokon, kien Hindbad volis, ke oni portu ĝin. Poste, li tiamaniere ekparolis:

## Unua vojaĝo de Sindbad la maristo

Mi heredis de mia familio grandegan havaĵon, mi malŝparis ties pli grandan parton en la diboĉoj de mia juneco; sed mi rekonsciigis kaj pripensante, mi agnoskis, ke la riĉaĵoj estas efemeraj, kaj ke oni baldaŭ vidas ties finon, kiam oni tiom malbone zorgas pri ili, kiel mi agis. Mi plie opiniis, ke mi vane malŝparas en sencela vivo la tempon, kiu estas en la mondo la plej valora elemento. Mi ankoraŭ opiniis, ke estas la lasta kaj la plej bedaŭrinda el la mizeroj esti malriĉa en sia maljuna aĝo. Mi rememoris tiujn parolojn de la granda Salomono, kiujn mi antaŭe aŭdis de mia patro, ke *estas malpli penige troviĝi en la tombo ol en la malriĉeco*.

Malserenigita de ĉiuj tiuj pripensoj, mi kolektis la restaĵojn de mia heredaĵo, mi aŭkcie vendis en la bazaro ĉion, kion mi havis en mia domo. Mi poste asociigis kun kelkaj komercistoj, kiuj okupiĝis pri mara komerco. Mi konsultis tiujn, kiuj ŝajnis al mi kapablaj provizi min per bonaj konsiloj. Fine mi decidis fruktigi la mallulton da mono, kiu restis al mi, kaj tuj kiam mi decidis tion, mi mallonge atendis antaŭ ol efektiviĝi ĝin. Mi tiam iris al Basora<sup>1</sup>, kie mi surŝipiĝis kun pluraj komercistoj sur ŝipo, kiun ni frajtis danke al nia kunigita mono.

Ni ekvelis, kaj iris laŭ la vojo de Orientaj Indioj tra la Persa golfo, kiu estas formita per la bordo de Feliĉa Arabio<sup>2</sup> dekstraflanke, kaj de Persio maldekstraflanke, kaj kies plej ampleksa larĝeco estas sepdek leŭgoj, laŭ la komuna opinio. Ekster tiu golfo, la Levanta maro<sup>3</sup>, la sama kiel tiu de Hindioj, estas tre vasta: ĝi havas sur unu flanko kiel limojn, la bordojn de Abisinio kaj ampleksas kvarmil kvincent leŭgojn en longeco ĝis la insuloj Vakvak<sup>4</sup>. Mi unue estis ĝenata pro tio, kion oni nomas marmalsano; sed mi baldaŭ resaniĝis, kaj ekde tiu tempo, mi ne plu suferis pro tiu malsano.

Dum nia navigado, ni albordigis plurajn insulojn kaj ni tie vendis aŭ interŝanĝis niajn varojn. Iun tagon, kiam ni iris pelitaj de la vento,

<sup>1</sup> *Balsora* aŭ *Basora*, grava komerca haveno de Irako, fondita en 636 de Omar. Galland ĉiam uzas la formon *Balsora*: en la traduko ni preferos uzi la kutiman modernan *Basora*. (Ndlr.)

<sup>2</sup> Tio estas la romia nomo de la nuna Jemeno (sude-okcidente de Saud-Arabio). Sed elirante el Basora, oni trafas Saudi-Arabion, dekstre de la Persa golfo.

<sup>3</sup> Temas pri la Hindia Oceano.

<sup>4</sup> Nomitaj laŭ arbo, kies frukto tiel nomiĝas. Ili estas imagita lando pli fore ol Ĉinio laŭ la Araboj. Eble temas pri Japanio?

ĝi ĉesis blovi fronte al malgranda insuleto apenaŭ pli alta ol la mar-nivelo, kiu similis herbejon pro sia verdaĵo. La kapitano malhisigis la velojn kaj permesis al la membroj de la ŝipanaro, kiuj deziris surgrundiĝi iri tien. Mi estis en la nombro de tiuj, kiuj iris al la tero. Sed dum ni okupiĝis trinkante kaj manĝante kaj ripozante pro la mara laceco, la insulo subite ekstremis, kaj donis al ni fortan skuon...

Ĉe tiuj vortoj, Ŝeherazad haltis, ĉar la taglumo komencis aperi. Ŝi tiel reekparolis fine de la posta punkto:

## 71-a punkto

– Senjoro, Sindbad daŭrigis sian rakonton:

– Oni ekkonsciis, li diris, pri la tremo de la insulo en la ŝipo, de kie oni kriis al ni rapide reveni: ni ĉiuj pereos, ĉar tio, kion ni mistaksis por insulo estis la dorso de baleno. La plej rapidaj fuĝis en la barko, aliaj impetis en la maron kaj naĝis. Rilate min, mi daŭre troviĝis sur la insulo, tio estas sur la baleno, kiam ĝi mergiĝis en la maron kaj mi havis nur sufiĉe da tempo por alkroĉiĝi al peco de ligno, kiun oni alportis el la ŝipo por fari fajron. Dume, la kapitano akceptinte sur la ferdekon la homojn de la barko, kaj kolektinte kelkajn el tiuj, kiuj naĝis, volis profiti malvarmetan kaj favoran venton, kiu ekblovis; li hisigis la velojn kaj tiel forprenis de mi la esperon atingi la ŝipon.

Mi do restis en la povo de la akvo, puŝata ĉu sur unu flankon, ĉu sur alian; mi luktis por mia vivo kontraŭ la ondoj la ceteron de la tago kaj la postan nokton. La sekvan tagon mi ne plu havis forton, kaj mi malesperis eviti la morton, kiam iu ondo feliĉe ĵetis min kontraŭ iu insulo. Ties bordo estis alta kaj kruta, kaj mi spertus multe da peno por grimpi tien, se kelkaj arbaj radikoj, kiujn la fortuno ŝajne konservis en tiu loko, ne donus al mi tiun rimedon. Mi sterniĝis sur la grundon, kie mi restis duone mortinta, ĝis estis plena tago kaj aperis la suno.

Tiam, kvankam mi estis tre malforta pro la laboro de la maro, kaj ĉar mi glutis neniun manĝaĵon ekde la antaŭa tago, mi tamen trenis min serĉante herbojn taŭgajn por manĝi. Mi trovis kelkajn kaj mi havis la feliĉon trafi bonegan akvan fonton, kiu tre kontribuis al mia resaniĝo. Kiam miaj fortoj revenis, mi eniris la insulon, paŝante sen preciza celo. Mi eniris en belan ebenaĵon kaj de fore mi ekvidis paŝtiĝantan ĉevalon. Mi iris tiuflanken, hezitante inter timo kaj ĝojo: ĉar mi ne sciis, ĉu mi iras por serĉi mian perdon prefere al okazo meti mian vivon en sekurecon. Dum mi alproksimiĝis, mi rimarkis, ke ĝi estas purrasa ĉevalino ligita al paliseto. Ties beleco altiris mian atenton, sed dum mi rigardis ŝin, mi aŭdis la voĉon de viro, kiu parolis sub la tero. Momenton poste, tiu viro aperis, venis al mi, kaj demandis min, kiu mi estas. Mi rakontis al li mian aventuron; post kio, prenante min je la mano, li enirigis min en groton, kie troviĝis aliaj personoj, kiuj estis ne malpli surprizitaj vidi min ol mi mem trafi ilin tie.

Mi manĝis parton de kelkaj manĝaĵoj, kiujn ili prezentis al mi,

poste demandinte ilin kion ili umas en loko, kiu aspektis al mi tiom dezerta, ili respondis al mi, ke ili estas stalistoj de la reĝo Mihraĝ<sup>5</sup>, suvereno de tiu insulo, ke ĉiun jaron en la sama sezono, ili kutimas konduki ĉi tien la purrasajn ĉevalinojn de la reĝo, kiujn ili ligas laŭ la maniero, kiun mi vidis, por ke mara ĉevalo, kiu eliras el la maro, kuniĝu kun ili. La mara ĉevalo post kuniĝo kun ili preparas sin por vori ilin, sed ili malebligas tion pere de siaj krioj, kaj devigas ĝin retroiri en la maron; kiam la ĉevalinoj estas gravedaj, ili reprenas ilin, kaj la ĉevaloj, kiuj naskiĝos el tiu kuniĝo estas destinitaj al la reĝo kaj nomataj maraj ĉevaloj. Ili aldonis, ke ili devas foriri morgaŭ, kaj se mi alvenus unu tagon pli malfrue, mi nepre pereus, ĉar la domoj estas foraj, kaj ne eblus al mi atingi ilin sen gvidado.

Dum ili tiel parolis al mi, la mara ĉevalo eliris el la maro, kiel ili diris al mi, impetis al la ĉevalino, kuniĝis kun ŝi kaj poste volis vori ŝin; sed pro la granda bruoj, kiun okazigis la stalistoj, ĝi forlasis ŝin kaj retroiris kaj plonĝis en la maron.

La postan tagon, ili reekvojis laŭ la direkto al la ĉefurbo de la insulo kun la ĉevalinoj, kaj mi akompanis ilin. Ĉe nia alveno, reĝo Mihraĝ, al kiu oni prezentis min, demandis min, kiu mi estas, kaj pro kiu aventuro mi troviĝas en liaj Ŝtatoj. Tuj kiam mi plene kontentigis lian scivolemon, li montris al mi, ke li multe partoprenas mian malfeliĉon. Samtempe, li ordonis, ke oni zorgu pri mi, kaj ke oni provizu min per ĉio, kion mi bezonus. Tio estis tiamaniere farita, ke mi devis esti kontenta pro lia malavareco kaj la zorgo de liaj oficistoj.

Ĉar mi estis komercisto, mi frekventis la personojn kun la sama profesio. Mi aparte serĉis tiujn, kiuj estas fremduloj tiom por ekscii de ili novaĵojn pri Bagdado, kiom por trovi iun, kun kiu mi povos reĥjmenvojaĝi: ĉar la ĉefurbo de reĝo Mihraĝ situas apud la maro kaj havas belan havenon, kie ĉiutage albordiĝas ŝipoj el diversaj lokoj de la mondo. Mi ankaŭ serĉis la kunecon de scienculoj el Indioj, kaj mi havis plezuron aŭskulti ilin paroli; sed tio ne malhelpis min tre regule ĉeesti en la kortego de la reĝo, kaj babili kun provincestroj kaj reĝetoj, liaj tributuloj, kiuj troviĝis apud lia persono. Ili metis al mi mil demandojn pri mia lando, kaj miaflanke, ĉar mi volis lerni iliajn morojn kaj la leĝojn de iliaj Ŝtatoj, mi demandis ĉion, kio kapablis meriti mian scivolemon.

Ekzistas sub la dominado de reĝo Mihraĝ iu insulo, kiu nomiĝas Kasel<sup>6</sup>. Oni certigis al mi, ke oni tie aŭdas ĉiunokte sonon de timbaloj, kio naskis la opinion, kiun havas la maristoj, ke Degjal<sup>7</sup> tie loĝas. Mi ekdeziris fariĝi atestanto de tiu mirindaĵo, kaj mi vidis dum mia vojaĝo fiŝojn longajn je cent aŭ ducent klaftoj<sup>8</sup>, kiuj pli timigas ol ili nocas. Ili estas tiom timidaj, ke oni forfuĝigas ilin frap-

<sup>5</sup> Malnova reĝo de Indio, konata pro sia potenco kaj saĝeco. La nomo *Mihraĝ* rekte fontas el la hinda vorto *maharaĝa*.

<sup>6</sup> Legenda insulo.

<sup>7</sup> Degjal aŭ Deĝal estas la nomo de la Antikristo aŭ diablo por la muzulmanoj. Li havas nur unu okulon kaj unu brovon.

<sup>8</sup> Unu klafto egalvaloras proksimume kvindek centimetrojn.

ante sur lignajn tabulojn. Mi rimarkis aliajn fiŝojn, kiuj longas nur unu klafton, kaj kiuj pro sia kapo similas otusojn.

Post mia reveno, kiam mi troviĝis iun tagon en la haveno, iu ŝipo venis por alboridiĝi. Tuj kiam ĝi ankriĝis, oni komencis malŝarĝi la varojn, kaj la komercistoj, al kiuj ili apartenis transportigis ilin en siajn staplojn. Rigardante kelkajn pakojn kaj la skribaĵon, kiu indikis, al kiu ili apartenas, mi vidis mian nomon kaj post atenta ekzameno, mi ne dubis, ke ili estas tiuj, kiujn mi ŝarĝigis sur la ŝipon, kiun mi elektis en Basora. Mi eĉ rekonis la kapitanon; sed ĉar mi estis konvinkita, ke li kredas min morta, mi aliris lin kaj demandis, al kiu apartenas la pakojn, kiujn mi vidas.

– Mi havis sur mia ŝipo, li respondis al mi, Bagdadan komerciston, kiu nomiĝis Sindbad. Iun tagon, kiam ni estis proksime al insulo, laŭŝajne, li tretis kun pluraj aliaj pasaĝeroj sur tiun ŝajnan insulon, kiu estis nenio alia ol baleno de grandega mezuro, kiu endormiĝis sur la akvo. Ĝi apenaŭ perceptis la varmon de la fajro, kiun oni ĵus flamigis sur ties dorso por prepari manĝaĵon, kiam ĝi komencis moviĝi kaj profundiĝi en la maro. La pli granda parto de la personoj, kiuj troviĝis sur ĝi mortis, kaj la kompatinda Sindbad estis inter ili. Tiuj pako estis liaj, kaj mi decidis vendi ilin ĝis mi renkontos iun el lia familio, al kiu mi povos doni la profiton, kiun mi akiros, same kiel la kapitalon.

– Kapitano, mi tiam diris al li, mi estas tiu Sindbad, kiun vi kredas mortinta, kaj kiu ne estas tia: tiuj pako estis mia havaĵo kaj miaj varoj...

Ŝeherezad ne pli parolis ĉi-nokte, sed tiel daŭrigis la postan tagon:

## 72-a nokto

Sindbad daŭrigante sian historion, diris al la kompanio:

– Kiam la kapitano de la ŝipo aŭdis min tiel paroli:

– Je Dio! li ekkriis, kiun fidi nun? Ne plu estas honesteco inter la homoj. Mi vidis per miaj propraj okuloj Sindbad-on pere; la pasaĝeroj, kiuj estis sur mia ŝipo same vidis tion kiel mi, kaj vi aŭdacas diri, ke vi estas tiu Sindbad? Kia honto! Rigardante vin, oni kredas, ke vi estas honesta homo, tamen vi diras hororigan malpravaĵon por kapti bienon, kiu ne apartenas al vi.

– Pacienca, mi respondis al la kapitano, kaj bonvolu aŭskultation, kion mi havas por diri al vi.

– Nu! li respondis, kion vi diros? Parolu, mi aŭskultas vin.

Mi tiam rakontis al li kiamaniere mi saviĝis, kaj per kiu hazardo mi renkontis la stalistojn de reĝo Mihraĝ, kiuj kondukis min al lia kortego.

Li sentis sin malfirmigita pro miaj paroloj, sed li baldaŭ konvinkiĝis, ke mi ne estas mensogulo, ĉar alvenis personoj el lia ŝipo, kiuj rekonis min kaj faris al mi grandajn salutojn, kaj elmontris la ĝojon, kiun ili spertis revidante min. Fine ankaŭ li mem rekonis min, kaj impetante al mia kolo:



– Laŭdata estu Dio, li diris al mi, ĉar vi feliĉe eliris el tiom grava danĝero! mi ne povas sufiĉe atesti pri la plezuro, kiun mi spertas pro tio. Jen via havaĵo, prenu ĝin, ĝi estas la via, faru el ĝi, kio plaĉos al vi.

Mi dankis lin, laŭdis lian honestecon, kaj por agnoski ĝin, mi petis lin akcepti kelkajn varojn, kiujn mi prezentis al li, sed li rifuzis ilin.

Mi elektis tion, kio plej valoris el miaj pakoj, kaj donacis tion al reĝo Mihraĝ. Ĉar tiu princo konis la malfeliĉon, kiu okazis al mi, li demandis min, kie mi trovis tiajn maloftajn varojn. Mi rakontis al li, pro kiu hazardo mi ĵus reakiris ilin, li havis la bonecon aperigi ĝojon; li akceptis mian donacon kaj faris al mi aliajn multe pli valorajn. Post tio, mi adiaŭis lin kaj denove surŝipiĝis sur la sama boato. Sed antaŭ mia surŝipiĝo, mi interŝanĝis la varojn, kiuj restis al mi, kontraŭ aliaj el tiu lando. Mi forportis kun mi aloan lignon, santalon, kamforon, muskadan nukson, kariofilon, pipron kaj zingibron. Ni preternavigis plurajn insulojn kaj fine atingis Basora-n, kiun mi trafis kun valoro de proksimume cent mil zekinoj. Mia familio akceptis min kaj mi revidis ĝin kun ĉiuj pruvoj, kiujn kapablas kaŭzi vigla kaj sincera amikeco. Mi aĉetis sklavojn de ambaŭ seksoj, belajn terojn kaj mi konstruigis grandan domon. Ja tiel mi instalas min, deciditan forgesi la penojn, kiujn mi trasuferis kaj ĝui la plezurojn de la vivo.

Sindbad haltis en tiu momento, ordonis al la ludistoj de muzikinstrumentoj rekomenci sian koncerton, kiun li interrompis pro la rakonto de sia historio. Oni daŭre ĝis la vespero trinkis kaj manĝis, kaj kiam venis la momento por retiriĝi, Sindbad alportigis al si monujon kun cent zekinoj, kaj donante ĝin al la portisto:

– Prenu, Hindbad, li diris al li; reiru hejmen kaj revenu morgaŭ por aŭskulti la sekvon de miaj aventuroj.

La portisto retiriĝis tute konfuzita pro la honoro kaj la donaco, kiun li ĵus ricevis. La raporto, kiun li faris pri tio en sia hejmo, tre plaĉis al lia edzino kaj al liaj infanoj, kiuj ne forgesis danki Dion pro la bono, kiun okazigis al ili la Providenco pere de Sindbad.

Hindbad vestiĝis la postan tagon pli dece ol la antaŭan tagon, kaj reiris ĉe la malavara vojaĝanto, kiu akceptis lin per ridanta mieno kaj diris al li mil komplimentojn. Tuj kiam ĉiuj invititoj alvenis, oni prservis kaj ĉiuj ĉetabliĝis tre longe. Kiam la manĝo finiĝis, Sindbad ekparolis kaj alparolante la ĉeestantojn:

– Senjoroj, li diris, mi petas vin lasi min paroli kaj bonvoli aŭskulti la aventurojn de mia dua vojaĝo; ili pli indas vian atenton ol tiuj de la unua.

Ĉiuj silentis, kaj Sindbad tiel parolis:

## Dua vojaĝo de Sindbad la maristo

Mi decidis, post mia unua vojaĝo, trankvile pasigi la ceteron de mia vivo en Bagdado, kiel mi havis la honoron diri tion al vi hieraŭ. Sed pasis ne multe da tempo kaj mi enuis pro senokupa vivo; la deziro vojaĝi kaj negoci surmare revenis al mi: mi aĉetis varojn taŭgajn por la komerco, kiun mi intencis fari, kaj mi fornavigis duan fojon kun aliaj komercistoj, kies honestecon mi konis. Ni enŝipiĝis sur bonkvalitan ŝipon, kaj rekomendinte nin al Dio, ni komencis nian navigadon.

Ni iris de insulo al insulo, kaj tie tre favore interŝanĝis niajn varojn. Iun tagon, kiam ni tretis unu el tiuj insuloj, kiun kovris pluraj sortoj de fruktoarboj, sed tiom senhoma, ke ni trafis neniun domon, kaj eĉ ne unu animon. Ni iris por promeni tra la herbejoj kaj laŭlonge de la rojoj, kiuj akvumis ilin.

Dum la unuaj amuziĝis plukante florojn, kaj la aliaj fruktojn, mi prenis miajn manĝaĵojn kaj vinon, kiun mi kunportis, kaj sidiĝis apud akvo fluanta inter altaj arboj, kiuj provizis belan ombbron. Mi faris sufiĉe bonan manĝon per tio, kion mi havis; post kio dormo ektrafis miajn sensojn. Mi ne diros al vi, ĉu mi longe dormis, sed kiam mi vekigis, mi ne plu vidis la ankritan ŝipon...

Tie, Ŝeherazad devis interrompi sian rakonton, ĉar ŝi vidis, ke la taglumo ekaperis; sed la postan nokton, ŝi tiamaniere daŭrigis la duan vojaĝon de Sindbad.

### 73-a nokto

Mi estis tre mirigita, diris Sindbad, ne plu vidi la ankritan ŝipon; mi leviĝis, mi ĉien rigardis kaj mi vidis neniun el la komercistoj, kiuj iris sur la insulon kun mi. Mi vidis nur la ŝipon kun siaj veloj, sed tiom malproksiman, ke ĝi malaperis el mia vido mallonge poste.

Mi lasas vin imagi la pripensojn, kiuj invadis min en tiom malgaja stato. Mi preskaŭ mortis pro doloro. Mi eligis teruregajn kriojn; mi frapis mian kapon, kaj ĵetis min surteren, kie mi longe restis mergita en mortodona konfuzo de pensoj ĉiuj pli malĝojegaj ol la aliaj. Mi centfoje riproĉis al mi, ke mi ne kontentiĝis je mia unua vojaĝo, kiu devus senigi min por ĉiam je la deziro fari aliajn. Sed ĉiuj miaj bedaŭroj estis senutilaj kaj mia pentro tro malfrua.

Fine, mi rezignaciis je la volo de Dio, kaj ne sciante, kio okazos al mi, mi grimpis ĝis la supro de alta arbo, de kie mi rigardis en ĉiujn direktojn por vidi, ĉu mi ne malkovros ion, kio kapablos doni al mi iom da espero. Rigardante al la maro, mi vidis nur akvon kaj ĉielon, sed ekvidinte en la direkto al la tero ion blankan, mi malgrimpis desur la arbo, kaj kun la cetero de la manĝaĵo, kiu restis al mi, mi ekpaŝis direkte al tiu blankaĵo, kiu troviĝis tiom malproksima, ke mi ne kapablis bone distingi, kio ĝi estas.

Kiam mi troviĝis je sufiĉa distanco, mi rimarkis, ke ĝi estas blanka bulo de mirinda alteco kaj grandeco. Tuj kiam mi troviĝis apude, mi tuŝis ĝin kaj taksis ĝin tre glata. Mi paŝis ĉirkaŭ ĝi por vidi, ĉu estas aperturo; mi kapablis malkovri neniun, kaj ŝajnis al mi, ke estas neeble grimpi sur ĝin tiom glata ĝi estas. Ĝi eble ampleksis kvindek paŝojn laŭ la ĉirkaŭo.

La suno tiam pretis kuŝiĝi. La aero subite obskuriĝis kvazaŭ ĝin kovrus dika nubo. Sed se tiu obskuro mirigis min, mi estis ankoraŭ multe pli mirigita, kiam mi ekkonsciis, ke tio, kio kaŭzas tion estas birdo de eksterordinara grandeco kaj dikeco, kiu alflugas al mi. Mi rememoris pri birdo nomata rok, pri kiu mi ofte aŭdis far la maristoj, kaj mi komprenis, ke la dika bulo, kiun mi tiom admiris verŝajne estas la ovo de tiu birdo. Efektive ĝi malsuprenflugis kaj metis sin suren, kvazaŭ por kovi ĝin. Vidante ĝin, kiu alflugas, mi tre forte premis min kontraŭ la ovo, tiel ke mi havis antaŭ mi unu el la piedoj de la birdo, kaj tiu piedo estis tiom granda kiom dika arba trunko. Mi forte ligis min al ĝi per la tolo, kiu ĉirkaŭis mian turbanon, esperante, ke la rok, kiam ĝi ekflugos morgaŭ, forportos min el tiu senhoma insulo. Efektive, trapasinte la nokton en tiu stato, tuj kiam tagis, la birdo ekflugis kaj forprenis min tiom alte, ke mi ne plu vidis la teron; poste ĝi subite malsuprenflugis kun tiom da rapideco, ke mi senkonsciiĝis. Kiam la rok estis surtere, kaj kiam mi vidis min sur la grundo, mi rapide malligis la nodon, kiu tenis min ligita ĉe ĝia piedo. Mi apenaŭ finis tiun malligadon, kiam ĝi ekbekumis serpenton de nekredebla longeco. Ĝi ekprenis ĝin kaj tuj forflugis.

La loko, kie ĝi lasis min, estis tre profunda valo, ĉie ĉirkaŭita de tiom altaj montoj, ke ties supro perdiĝis en la nuboj, kaj tiom krutaj, ke troviĝis neniu vojo, laŭ kiu eblus grimpi. Tio fariĝis nova zorgo por mi, kaj komparante tiun lokon kun la senhoma insulo, kiun mi ĵus forlasis, mi opiniis, ke mi gajnis nenion en la ŝanĝo.

Paŝante en tiu valo, mi rimarkis, ke en ĝi estas dissemitaj diamantoj, el kiuj kelkaj estas de miriga grandeco. Mi prenis multe da plezuro rigardante ilin, sed mi baldaŭ ekvidis de fore ion, kio multe malpliigis tiun plezuron, kaj kion mi povis vidi nur kun timo. Estis granda nombro da serpentoj tiom dikaj kaj longaj, ke ĉiu el ili kapablus engluti elefanton. Dumtage ili retiriĝas en siajn grotojn, kie ili kaŝiĝas pro la rok, sia malamiko, kaj eliras nur nokte.

Mi pasigis la tagon promenante en tiu valo, kaj ripozante de tempo al tempo en la plej oportunaj lokoj. Tamen la suno kuŝiĝis, kaj ĉe la komenco de la nokto mi retiriĝis en groton, kie mi opiniis min en sekureco. Mi ŝtopis ties enirejon, kiu estis malalta kaj streta, per sufiĉe granda ŝtono, por protekti min kontraŭ la serpentoj, sed kiu estis ne sufiĉe aĝustigita, tiel ke ĝi ne malebligis al iom da lumo enpenetri. Mi vespermanĝis per parto de mia provianto, ĉe la bruo de la serpentoj, kiuj ekaperis. Iliaj teruraj sibloj treege timigis min kaj ne ebligis al mi, kiel vi povas kompreni, pasigi tre trankvilan nokton. Kiam venis la tago, la serpentoj retiriĝis. Tiam, tremante, mi eliris el mia groto kaj mi povas diri, ke mi tre longe paŝis sur diamantoj tute ne dezirante havi ilin. Fine mi sidiĝis kaj spite la maltrankvil-

econ, kiu okupis min, ĉar mi ne fermis okulon tra la tuta nokto, mi endormiĝis denove manĝinte el mia provianto. Sed mi apenaŭ ekdormis, kiam io, kio falis apud mi kun granda bruo, vekis min. Tio estis granda peco de kruda karno, kaj en la sama momento, mi vidis ruliĝi plurajn aliajn el la supro de la rokoj en diversaj lokoj.

Mi ĉiam konsideris kiel fabelon inventitan por la plezuro rakonti ĝin tion, kion mi plurfoje aŭdis de maristoj aŭ de aliaj personoj rilate la valon de la diamantoj, kaj la ruzon, kiun uzas kelkaj komercistoj por eltiri el ĝi tiujn juvelŝtonojn. Mi bone konsciis, ke ili diris al mi la veron. Efektive, tiuj komercistoj iras proksime de tiu valo en la epoko, kiam la agloj havas siajn idojn. Ili distranĉas viandon kaj ĵetas ĝin en grandaj pecoj en la valon; la diamantoj, sur kies pinton ili falas gluiĝas. La agloj, kiuj estas en tiu lando pli fortikaj ol aliloke, impetas al tiuj karnopecoj, forportas ilin en siajn nestojn supre de la rokoj por doni ilin kiel manĝaĵon al siaj aglidoj. Tiam, la komercistoj kurante al la nestoj, devigas per siaj krioj la aglojn forflugi kaj ili prenas la diamantojn, kiujn ili trovas gluitaj sur la karnopecoj. Ili uzas tiun ruzon, ĉar estas neniam alia rimedo por eltiri la diamantojn el tiu valo, kiu estas krutegaĵo, en kiun ne eblas malsuprengrimpi.

Mi ĝis tiam kredis, ke ne estos eble al mi eliri el tiu abismo, kiun mi konsideris kiel mian tombon; sed mi ŝanĝis mian opinion, kaj tio, kion mi ĵus vidis donis al mi iun ideon por konservi mian vivon...

La tago, kiu ĵus aperis en tiu momento trudis silenton al Ŝeherazad; sed ŝi daŭrigis tiun historion la postan tagon.

## 74-a nokto

– Senjoro, ŝi diris, daŭre alparolante la sultanon de Indioj, Sindbad plu rakontis la aventurojn de sia dua vojaĝo al la kompanio, kiu aŭskultis lin:

– Mi komencis, li diris, pluki la plej grandajn diamantojn, kiuj aperis antaŭ miaj okuloj kaj mi plenigis per ili la ledan sakon, kiun mi uzis por enteni mian provianton. Mi poste prenis la viandan pecon, kiu ŝajnis al mi la plej longa kaj forte ligis ĝin ĉirkaŭ mi per la tolo de mia turbano; tiel aranĝita, mi sterniĝis kun la ventro al la tero, kaj la leda sako ligita al mia zono tiamaniere, ke ĝi ne povos fali.

Mi apenaŭ troviĝis en tiu situacio, kiam alflugis la agloj; ĉiu kaptis po unu viandan pecon, kiun ĝi forportis, kaj unu el la plej potencaj same forportinte min kun la vianda peco, en kiu mi involviĝis, portis min al la supro de la monto, ĝis sia nesto. La komercistoj tiam nepre kriis por timigi la aglojn, kaj kiam ili devigis tiujn forlasi sian predon, unu el ili alproksimiĝis al mi, sed timo trafis lin, kiam li ekvidis min. Li tamen trankviliĝis, kaj anstataŭ informiĝi sekve de kiu aventuro mi troviĝas ĉi tie, li komencis kvereli kun mi demandante min, kial mi ŝtelas lian havaĵon.

– Vi parolos, mi diris al li, kun pli da ĝentileco, kiam vi pli bone konos min. Konsolu vin, mi aldonis, mi havas diamantojn por vi kaj

por mi, pli ol povas havi ĉiuj aliaj komercistoj kune. Se ili havas kelkajn, tio estas nura hazardo, dum mi mem elektis, funde de la valo, tiujn, kiujn mi alportas en tiu sako, kiun vi vidas.

Dirante tion, mi montris ĝin al li. Mi ankoraŭ ne finis paroli, kiam la aliaj komercistoj, kiuj ekvidis min ariĝis ĉirkaŭ mi, tre mirigitaj vidi min, kaj mi pliigis ilian miron danke al la rakonto de mia historio. Ili ne tiom admiris la ruzon, kiun mi imagis por savi min, kiom la aŭdacon por efektiviĝi ĝin.

Ili kondukis min al la loĝejo, kie ili ĉiuj kune loĝas, kaj tie, malferminte mian sakon en ilia ĉeesto, la dikeco de miaj diamantoj surprizis ilin, kaj ili konfesis al mi, ke en ĉiuj kortegoj, kie ili estis, ili neniam vidis unu, kiu samvalorus ilin. Mi petis la komerciston, al kiu apartenis la neston, kien mi estis transportita, ĉar ĉiu negocisto havas la sian propran, mi petis lin, mi diras, elekti kiel sian parton, tiom kiom li volos. Li kontentiĝis elektante nur unu, sed ĝi estis unu el la plej malgrandaj, kaj ĉar mi insistis, por ke li prenu aliajn ne timante noci al mi:

– Ne, li diris al mi, mi estas tre kontenta kun tiu ĉi, kiu estas sufiĉe valora por ŝpari al mi la penon ekde nun efektiviĝi aliajn vojaĝojn por la kreado de mia eta riĉeco.

Mi pasigis la nokton kun tiuj komercistoj, al kiuj mi duan fojon rakontis mian historion, por la plezuro de tiuj, kiuj ne aŭdis ĝin. Mi ne kapablis mildigi mian ĝojon, kiam mi rimarkigis, ke mi estas ekster la danĝeroj, pri kiuj mi parolis al vi. Ŝajnis al mi, ke la stato, en kiu mi troviĝas estas sonĝo, kaj mi ne povis kredi, ke mi ne plu havas ion por timi.

Jam de pluraj tagoj la komercistoj ĵetis tiujn viandajn pecojn en la valon, kaj ĉar ĉiu aspektis kontenta pro la diamantoj, kiujn li plukis, ni foriris la postan tagon ĉiuj kune, kaj ni paŝis tra altaj montoj, kie troviĝis serpentoj de miriga longeco, kiujn ni feliĉe evitis. Ni atingis la unuan havenon, de kie ni transiris al la insulo Roha<sup>9</sup>, kie kreskas la arbo, de kiu oni ricevas kamforon, kaj kiu estas tiom dika kaj tiom foliriĉa, ke cent homoj povas facile troviĝi sub ties ombro. La suko, el kiu formiĝas la kamforo fluas el truo, kiun oni faras en la supro de la arbo, kaj oni ricevas ĝin en vazon, kie ĝi plidensiĝas kaj fariĝas tio, kion oni nomas kamforo. Kiam la suko estas elĉerpita, la arbo sekiĝas kaj mortas.

Troviĝas en la sama insulo rinoceroj, kiuj estas animaloj malpli grandaj ol elefanto kaj pli grandaj ol bubalo; ili havas kornon sur la nazo, longan proksime je unu klafto; tiu korno estas solida kaj meze tranĉita de unu ekstremaĵo al la alia. Oni vidas sur ĝi blankajn strekojn, kiuj reprezentas homan vizaĝon. La rinocero luktas kontraŭ la elefanto, boras ĝin per sia korno sub la ventro levas kaj portas ĝin sur sia kapo, sed ĉar la sango kaj la graso de la elefanto falas sur ĝiajn okulojn kaj blindigas ĝin, ĝi falas surteren kaj kio mirigos vin, la birdo rok alvenas, kaj forflugas kun ili ambaŭ inter siaj krifoj kaj forportas ilin por nutri siajn idojn.

<sup>9</sup> Insulo proksima al Madagaskaro.

Mi primutas plurajn aliajn strangaĵojn de tiu insulo, pro timo enuigi vin. Mi tie interŝanĝis kelkajn el miaj diamantoj kontraŭ bonaj varoj. De tie ni iris al aliaj insuloj, kaj fine, trafinte plurajn negocajn urbojn de la firma grundo, ni surteriĝis en Basora, de kie mi iris al Bagdado. Mi tie antaŭ ĉio donis grandajn almozojn al la malriĉuloj kaj mi honeste ĝuis la ceteron de la senlimaj riĉaĵoj, kiujn mi alportis kaj akiris per tiom da laco.

Tiel Sindbad rakontis sian duan vojaĝon. Li denove donigis cent zekinojn al Hindbad, kiun li invitis veni la postan tagon por aŭskulti la rakonton de la tria vojaĝo. La invititoj retrohejmeniris, kaj revenis la postan tagon je la sama horo, same kiel la portisto, kiu jam preskaŭ forgesis sian antaŭan malriĉecon. Ili ĉetabliĝis kaj, post la manĝo, Sindbad petinte atenton, tiamaniere detalis sian trian vojaĝon:

## Tria vojaĝo de Sindbad la maristo

Mi baldaŭ perdis en la dolĉaĵoj de la vivo, kiun mi vivis, la rememoron pri la danĝeroj, kiujn mi trafis dum miaj du vojaĝoj; sed ĉar mi estis en mia junaĝo, mi enuis vivante en ripozo, kaj malgrandigante la novajn danĝerojn, kiujn mi volis alfronti, mi eliris el Bagdado kun riĉaj lokaj varoj, kiujn mi transportigis ĝis Basora. Tie mi denove sursipiĝis kun aliaj komercistoj. Ni longe navigis kaj ni haltis en pluraj havenoj, kie ni grandskale komercis.

Iun tagon, kiam ni troviĝis meze de la maro, ni estis trafataj de terura tempesto, kiu devojigis nin el nia celo. Ĝi daŭris dum pluraj tagoj kaj pelis nin antaŭ la haveno de iu insulo, kien la kapitano tre dezirus ne eniri; sed ni estis devigataj iri tien por ankriĝi. Kiam oni ferlis la velojn, la kapitano diris al ni:

– Ĉi tiu insulo kaj kelkaj aliaj najbaraj estas loĝataj de tre vilaj sovaĝuloj, kiuj baldaŭ venos por ataki nin. Kvankam ili estas nanoj, nia malfeliĉo volas, ke ni tute ne rezistu, ĉar ili estas pli nombraj ol la akridoj, kaj se okazus, ke ni mortigus kelkajn, ili ĉiuj impetus kontraŭ ni kaj batmortigus nin.

La taglumo, kiu venis por lumigi la apartamenton de Ŝahriar, malhelpis Ŝeherazad-on pli rakonti. La postan nokton, ŝi tiamaniere reekparolis:

## 75-a punkto

La paroloj de la kapitano, diris Sindbad naskis en la tuta ŝipanaro grandan aflikton, kaj ni baldaŭ komprenis, ke tio, kion li ĵus diris al ni estis nur tro vera. Ni vidis aperi sennombran multon de malbelegaj sovaĝuloj, kovritaj sur la tuta korpo per rufa hararo, kaj altaj je apenaŭ du futoj<sup>10</sup>. Ili ĵetis sin en la maron, naĝis kaj en malmulte

<sup>10</sup> Unu futo valoras 0,324 metrojn.

da tempo ĉirkaŭis nian ŝipon. Ili alparolis nin dum ili alproksimiĝis, sed ni ne komprenis ilian lingvon. Ili akroĉiĝis al la flankoj kaj al la ŝnuroj de la ŝipo, kaj grimpis ĉiuj ĝis la pli alta ferdeko kun tia granda lerteco kaj tiom da rapideco, ke ŝajne ili ne tuŝis la ŝipon per siaj piedoj.

Ni spektis ilin farantajn tion kun la timo, kiun vi povas imagi, ne aŭdacante defendi nin nek diri al ili unu solan vorton por provi forturni ilin de ilia celo, kiun ni suspektis esti pereiga. Efektive, ili malfaldis la velojn, tranĉis la kablون de la ankro ne zorgante eltiri ĝin, kaj alproksimiginte la ŝipon al la tero, ili surterigis nin ĉiujn. Ili poste forportis la ŝipon sur alian insulon, de kie ili venis. Ĉiuj vojaĝantoj zorge evitis tiun, sur kiu ni nun troviĝis, kaj estis tre danĝere tie halti pro la kialo, kiun vi baldaŭ aŭdos; sed ni devis pacience atendi.

Ni malproksimiĝis de la bordo kaj eniris en la insulon, ni trafis kelkajn fruktojn kaj herbojn, kiujn ni manĝis por plilongigi la lastan momenton de nia vivo kiel eble pleje: ĉar ni ĉiuj atendis certan morton. Dumpaŝe ni ekvidis sufiĉe fore de ni altan konstruaĵon, al kiu ni direktis niajn paŝojn. Tio estis bone konstruita palaco kaj tre alta, kiu havis duklapan ebonan pordon, kiun ni malfermis puŝante ĝin. Ni eniris en la korton kaj ni vidis rekte antaŭ ni vastan apartamenton kun vestiblo, kie troviĝis sur unu flanko amaso da homaj ostoj, kaj sur la alia granda nombro da rostostangoj. Ni ektemis ĉe tiu spektaklo, kaj ĉar ni estis lacaj pro nia paŝado, la kruroj falĉiĝis sub ni: ni falis surteren, trafitaj de morta timo, kaj ni tie restis senmovaj dum longa tempo.

La suno subiris, kaj dum ni estis en la kompatinda stato, kiun mi ĵus priskribis al vi, la pordo de la loĝejo tre brue malfermiĝis, kaj ni tuj vidis eliri tra ĝi hororvekan nigran homan formon, kun la staturo de altkreska palmarbo. Li havis meze de la frunto unu solan ruĝan fajran okulon similantan ardan karbopecon; la antaŭaj dentoj, kiuj estis tre longaj kaj tre pintaj, eliris el lia buŝo, kiu estis fendita almenaŭ tiom, kiom estas tiu de ĉevalo, kaj la malsupra lipo falis ĝis lia brusto. Liaj oreloj similis la orelojn de elefanto kaj kovris liajn ŝultrojn. Li havis hokajn ungojn kaj longajn kiel la krifoj de la plej grandaj birdoj. Vidante tiom hororigan giganton, ni ĉiuj svenis, kaj restis kvazaŭ mortintaj.

Fine, ni rekonsciiĝis kaj vidis lin, kiu sidis en la vestiblo. Li ekzamenis nin per sia ronda okulo. Post kiam li atente rigardis nin, li alproksimiĝis al ni, etendis sian manon al mi, plukis min je la nuko kaj ĉiufanken turnis min, kiel viandisto, kiu palpas ŝafan kapon. Bone rigardinte min, vidante, ke mi estas tiom magra, ke mi havas nur la haŭton sur la ostoj, li lasis min. Li laŭvice kaptis la aliajn, sammaniere ekzamenis ilin, kaj ĉar la kapitano estis la plej grasa el la tuta ŝipanaro, li tenis lin per unu mano, same kiel mi tenus paseron, kaj li enirigis stangon tra lia korpo; poste ekflamiginte grandan fajron, li rostis lin kaj glutis lin por sia vespermanĝo, en la loĝejo, kien li retiriĝis. Kiam li finmanĝis lin, li revenis en la vestiblon, kie li kuŝiĝis kaj ekdormis ronkante laŭ maniero pli brua ol la tondro. Lia dormo daŭris ĝis la posta mateno. Por ni, ne estis eblo ĝui ripozon

kaj ni pasigis la nokton en la plej kruela timo, kiu kapablas perturbi onin. Kiam alvenis la tago, la giganto vekigis, ekstaris, eliris kaj lasis nin en la palaco.

Kiam ni kredis lin for, ni ĉesigis la malgajan silenton, kiun ni konservis dum la tuta nokto, kaj ĉiuj vete plendantaj ni aŭdigis en la palaco niajn plendojn kaj ĝemojn. Kvankam ni estis en sufiĉe granda nombro kaj havis nur unu solan malamikon, ni ne tuj havis la ideon seniĝi je li per lia morto. Tiu projekto, kvankam tre malfacila por efektiviĝi, estis tamen tiu, kiun ni logike devis ellabori.

Ni diskutis pri diversaj aliaj projektoj, sed ni decidiĝis pri neniuj kaj, submetante nin al tio, kio plaĉos al Dio ordoni pri nia sorto, ni pasigis la tagon trapaŝante la insulon por nutri nin per fruktoj kaj plantoj kiel la antaŭan tagon. Ĉe la vespero, ni serĉis iun rifuĝejon sed trovis neniun kaj ni estis devigataj spite nin reiri al la palaco.

La giganto nepre revenis kaj denove vespermanĝis per unu el niaj kunuloj, poste, li ekdormis kaj ronkis ĝis la tago; post kio li eliris kaj lasis nin, kiel li jam agis antaŭe. Nia pozicio aspektis al ni tiom abomena, ke pluraj el niaj kunuloj estis pretaj impeti en la maron, prefere ol atendi tiom strangan morton; kaj tiuj instigis la aliajn por sekvi ilian ekzemplon. Sed unu el la kompanio tiam ekparolante :

– Estas malpermesite al ni, li diris, ke ni mortigu nin mem, kaj eĉ se tio estus permesita, ĉu ne estas pli racie, ke ni pensos kiamaniere seniĝi je la barbaro, kiu rezervas al ni tiom pereigan forpason ?

Ĉar venis al mi en la menson projekto pri tio, mi komunikis ĝin al miaj kunuloj, kiuj aprobis ĝin :

– Miaj fratoj, mi diris al ili, vi scias, ke estas multe da ligno laŭlonge de la marbordo; se vi kredas min, ni konstruu plurajn flosojn, kiuj kapablos porti nin, kaj tuj kiam ili estos pretaj, ni lasos ilin sur la bordo, ĝis ni taksos oportune uzi ilin. Dume, ni efektivigos la projekton, kiun mi proponis al vi por seniĝi je la giganto: se ĝi sukcesos, ni povos pacience atendi ĉi tie ĝis iu ŝipo preternavigos la insulon, kaj forportos nin for de tiu pereiga insulo; se male ni malsukcesigos nian projekton, ni rapide iros al niaj flosoj, kaj ni ekiros sur la maron. Mi konfesas, ke se ni elmetas nin al la furiozo de la ondoj sur tiom rompiĝemaj boatoj, ni riskas perdi nian vivon; sed eĉ se ni devus pereji, ĉu ne estas pli agrable lasi nin droni en la maro, ol en la intestoj de tiu monstro, kiu jam forvoris du el niaj kunuloj ?

Mian opinion aprezis ĉiuj, kaj ni ekkonstruis flosojn, kapablajn porti po tri personojn.

Ni reiris al la palaco ĉe la fino de la tago kaj la giganto alvenis tien malmulte da tempo post ni. Ni denove devis suferi, ke unu el niaj kunuloj estu rostita. Sed fine, jen kiamaniere ni venĝis nin je la krueleco de la giganto. Kiam li finis sian abomenindan vespermanĝon, li sterniĝis sur la dorso kaj ekdormis. Tuj kiam ni aŭdis lin ronki laŭ sia kutimo, naŭ el la plej aŭdacaj el ni kaj mi, ĉiu prenis po unu stangon; ni metis ties pinton en la fajron por ruĝigi ĝin, kaj poste ni samtempe enigis ĝin en lian okulon kaj krevis ĝin.

La doloro, kiun spertis la giganto elbuŝigis el li teruregan krion. Li subite leviĝis, etendis la manojn en ĉiujn direktojn por kapti unu



el ni por oferi lin al sia rabio; sed ni havis tempon por foriri el li, kaj ĵeti nin surgrunden en la lokoj, kie li ne kapablis trafi nin sub siaj piedoj. Vane serĉinte nin, li palpe trovis la pordon kaj eliris kun terurigaj hurloj...

Ŝeherazad ne pli diris tiun nokton; sed la postan nokton, ŝi tiel reekrakontis tiun historion:

## 76-a nokto

– Ni eliris el la palaco malantaŭ la giganto, daŭrigis Sindbad, kaj ni iris sur la bordon de la maro, en la lokon, kie troviĝis niaj flosoj. Ni antaŭ ĉio metis ilin sur la akvon kaj atendis ĝis tagiĝos por impeti sur ilin, kaze ke ni vidu la giganton veni al ni kun iu gvidanto de la sama speco; sed ni esperis, ke se li ne aperos, kiam la suno estos en la ĉielo, kaj se ni ne plu aŭdos liajn hurlojn, kiujn ni senĉese aŭdis, tio signifos, ke li perdis sian vivon, kaj en tiu kazo ni intencis resti sur la insulo kaj ne riski nian vivon sur la flosoj. Sed apenaŭ tagiĝis, kiam ni ekvidis nian kruelan malamikon, akompanatan de du gigantoj proksimume same altkreskaj, kiuj kondukis lin, kaj kun sufiĉe granda nombro da aliaj, kiuj iris antaŭ li per rapidaj paŝoj.

Vidante tion, ni ne hezitis ĵeti nin sur niajn flosojn, kaj ni komencis malproksimiĝi el la bordo uzante remilojn. La gigantoj, kiuj ekvidis tion, plukis grandajn ŝtonojn, alkuris al la bordo, eĉ eniris en la akvon ĝis la mezo de la korpo, kaj tiom trafe ĵetis ilin, ke krom la floso, sur kiu mi troviĝis, ĉiuj aliaj estis dispecigitaj, kaj la homoj kiuj estis sure dronis. Rilate min kaj miajn du kunulojn, ĉar ni remis per niaj tutaj fortoj, ni troviĝis la plej antaŭaj en la maro, kaj ekster la atingo de la ŝtonoj.

Kiam ni estis en la marmezo, ni fariĝis la ludilo de la vento kaj de la ondoj, kiuj ĵetis nin ĉu sur unu flankon, ĉu sur la alian, kaj ni pasigis tiun tagon kaj la postan nokton en kruela necerteco pri nia destino; sed la postan tagon ni havis la bonŝancon esti pelataj kontraŭ iu insulo, kie ni saviĝis kun multe da ĝojo. Ni tie trovis bonegajn fruktojn, kiuj multe helpis nin por ripari la fortojn, kiujn ni perdis.

Ĉe la vespero, ni endormiĝis sur la marbordo; sed vekis nin la bruo de la skvamoj de serpento longa kiel palmarbo rampanta sur la tero. Ĝi troviĝis tiom proksime de ni, ke ĝi englutis unu el miaj du kunuloj, spite la kriojn kaj la strebojn, kiujn li faris por seniĝi je la serpento, kiu plurfoje skuante lin, pistis lin kontraŭ la tero kaj finglutis lin. Ni tuj ekfuĝis, la alia kunulo kaj mi, kaj kvankam ni estis sufiĉe for, ni aŭdis kelkan tempon poste, bruon, kiu komprenigis al ni, ke la serpento elvomas la ostojn de la kompatindulo, kiun ĝi trafis. Efektive, ni vidis ilin la postan tagon kun hororo:

– Ho Dio! mi tiam ekkriis, al kiu danĝero ni estas submetitaj! Ni ĝojis hieraŭ, ĉar ni savis niajn vivojn for de la krueleco de iu giganto, kaj de la kolero de la akvo, kaj jen ni trafas danĝeron, kiu estas ne malpli pereiga.

Ni rimarkis, promenante, dikan arbon, tre altan, sur kiu ni inten-

cis pasigi la postan nokton por meti nin en sekurecon. Ni denove manĝis fruktojn kiel la antaŭan tagon, kaj fine de la tago, ni grimpis sur la arbon. Ni baldaŭ aŭdis la serpenton, kiu siblante venis ĝis la piedo de la arbo, kie ni troviĝis. Ĝi leviĝis laŭ la trunko, kaj renkontante mian kamaradon, kiu situis malpli alte ol mi, ĝi forglutis lin en unu fojo kaj retiriĝis.

Mi restis sur la arbo ĝis la tagiĝo kaj tiam mi malgrimpis pli morta ol viva. Efektive, mi povis atendi ne alian sorton ol tiun de miaj du kunuloj, kaj tiu penso tremigis min pro hororo, mi iomete paŝis por iri ĝis la maro kaj ĵeti min en ĝin; sed ĉar estas milde vivi kiom eble plej longe, mi rezistis kontraŭ tiu malesperiga emo, kaj submetiĝis al la volo de Dio, kiu laŭ sia volo disponas pri niaj vivoj.

Mi tamen ne maltrafis la okazon kunigi grandan kvanton da lignaj pecetoj, da dornarbetoj kaj da sekaj dornoj. Mi el ili faris plurajn faskojn, kiujn mi kunligis, disponinte ilin laŭ granda cirklo ĉirkaŭ la arbo, kaj mi ligis kelkajn transverse supre por kovri mian kapon. Farinte tion, mi enfermis min en tiun cirklon ĉe la komenco de la nokto, kun la malgaja konsolo, ke mi neglektis nenion por protekti min kontraŭ la kruela sorto, kiu minacis min. La serpento nepre revenis kaj turniĝis ĉirkaŭ la arbo, provante vori min, sed ĝi ne kapablis sukcesi pro la remparo, kiun mi konstruis por mi, kaj ĝi vane ĝis la tagiĝo uzis la stratagemon de kato, kiu sieĝas muson en rifuĝejo, kiun ĝi ne kapablas superi. Fine, post la tagiĝo, ĝi retiriĝis; sed mi ne aŭdacis eliri el mia fortikaĵo antaŭ ol la suno aperis.

Mi trovis min tiom laca pro la laboro, kiun ĝi postulis de mi, mi tiom suferis pro ĝia fetora spiro, ke ĉar la morto ŝajnis al mi preferinda al tiu hororaĵo, mi malproksimiĝis el la arbo, kaj ne rememorante pri la decido, en kiu mi troviĝis la antaŭan tagon, mi kuris al la maro kun la intenco impeti en ĝin kapon antaŭen...

Ĉe tiuj vortoj, Ŝeherezad, vidante, ke tagas, ĉesis paroli. La postan tagon, ŝi daŭrigis tiun rakonton kaj diris al la sultano:

## 77-a nokto

Senjoro, Sindbad daŭrigante sian trian vojaĝon:

– Dio, li diris, estis kortuŝita de mia malespero: en la momento kiam mi pretis tuj elani en la maron, mi ekvidis ŝipon sufiĉe fora de la bordo. Mi kriis per mia tuta forto, por ke oni aŭdu min, kaj mi malvolvis la tolon de mia turbano, por ke oni rimarku min. Tio estis ne senutila: la tuta ŝipanaro ekvidis min kaj la kapitano sendis al mi barkon. Kiam mi troviĝis sur la ferdeko, la komercistoj kaj la maristoj demandis min kun multe da diligenteco, pro kiu aventuro mi troviĝas sur tiu senhoma insulo; kaj post kiam mi rakontis al ili ĉion, kio okazis al mi, la plej maljunaj diris al mi, ke ili plurfoje aŭdis pri tiuj gigantoj, kiuj loĝas en tiu insulo; oni certigis al ili, ke ili estas antropofagoj, kaj ke ili manĝas la homojn nekuiritaj same kiel rostitaj. Rilate la serpentojn, ili aldonis, ke ili troviĝas en

abundo sur tiu insulo; ke ili kaŝiĝas tage, kaj ekaperas nokte. Post kiam ili montris al mi, ke ili sentas multe da ĝojo vidante min, kiu eskapis tiom da danĝeroj, ĉar ili ne dubis, ke mi bezonas manĝi, ili rapidis regali min per tio, kion ili havis plej bongusta; kaj la kapitano rimarkante, ke mia vestaĵo estas nur ĉifoj, malavare proponis al mi unu el la siaj.

Ni dum certa tempo navigis, ni ankriĝis en multaj insuloj kaj ni fine atingis la insulon Salahat, de kiu fontas la ligno santalo, kiu estas tre uzata ligno en medicino. Ni eniris la havenon kaj ankriĝis tie. La komercistoj komencis malŝarĝi siajn varojn por vendi ilin aŭ interŝanĝi. Dume, la kapitano vokis min kaj diris al mi:

– Frato, mi havas kiel deponaĵon varojn, kiuj apartenis al komercisto, kiu dum certa tempo navigis sur mia ŝipo. Ĉar tiu komercisto mortis, mi valorigis ilin por raporti pri ili al liaj heredontoj, kiam mi renkontos unu el ili. La pakoj, pri kiuj li parolis jam troviĝis sur la ferdeko. Li montris ilin al mi dirante:

– Jen la preparolitaj varoj, mi esperas, ke vi bonvolos zorgi pri ties komercado, sub la kondiĉo, ke vi estos pagita pro via laboro.

Mi konsentis, dankante lin, ke li donas al mi la okazon ne resti senokupa.

La librotenisto de la ŝipo registris ĉiujn pakojn kun la nomoj de la komercistoj, al kiu ili apartenis. Ĉar li demandis la kapitanon, sub kiu nomo li volas, ke li registru tiujn, kies zorgon li ĵus konfidis al mi:

– Skribu, respondis al li la kapitano, sub la nomo de Sindbad la maristo.

Mi ne povis aŭdi mian nomon sen emocio, kaj rigardante la kapitanon, mi rekonis lin, kiel tiun, kiu dum mia dua vojaĝo, forlasis min en la insulo, kie mi endormiĝis apud roĵo, kaj kiu forvelis ne atendante min nek sendante iun por revenigi min. Mi unue ne rekonis lin pro la ŝanĝo, kiu okazis en li depost la tempo, kiam mi vidis lin.

Rilate lin, kiu kredis min mortinta, oni ne devas miri, ke li ne rekonis min.

– Kapitano, mi diris al li, ĉu la komercisto, al kiu apartenis tiuj pakoj nomiĝis Sindbad?

– Jes, li respondis al mi, li tiel nomiĝis; li estis el Bagdado kaj surŝipiĝis kun mi en Basora. Iun tagon, kiam ni surteriĝis sur insulon por trovi akvon kaj preni kelkajn refreŝigojn, mi ne scias pro kiu eraro mi ekvelis ne atentinte, ke li ne revenis kun la aliaj. Ni ekkonsciis pri tio, la komercistoj kaj mi, nur kvar horojn poste. La vento blovis el malantaŭe, kaj tiom vigla, ke ne eblis ŝanĝi nian direkton por retroiri tien por revenigi lin.

– Vi do kredas lin mortinta? mi reekparolis.

– Tutcerte, li respondis.

– Nu! kapitano mi respondis al li, malfermu viajn okulojn kaj rekonu tiun Sindbad, kiun vi lasis en tiu senhoma insulo! Mi endormiĝis apud roĵo, kaj kiam mi vekigis, mi plu vidis neniun el la ŝipanaro.

Ĉe tiuj vortoj, la kapitano komencis atente rigardi min...

Ŝehrazad en tiu momento, ekvidante, ke tagas, estis devigata eksilenti. La postan tagon, ŝi tiel daŭrigis sian rakonton:

## 78-a nokto

– La kapitano, diris Sindbad, tre atente rigardinte min, fine rekonis min:

– Laŭdata estu Dio! li ekkriis kisante min; mi estas tre kontenta, ke la fortune riparos mian eraron. Jen viaj varoj, kiujn mi ĉiam atente konservis kaj valorigis en ĉiuj havenoj, kien mi eniris. Mi retrodonas ilin al vi kun la profito, kiun mi ricevis el ili.

Mi prenis ilin, atestante al la kapitano la tutan dankemon, kiun mi ŝuldis al li.

El la insulo Salahat, ni navigis al alia, kie mi provizis min per kariofilo, cinamo kaj aliaj spicoj. Kiam ni estis for, ni vidis testudon, kiu ampleksis 20 klaftojn laŭ la longeco kaj larĝeco; ni ankaŭ rimarkis fiŝon, kiu similis bovinon; ĝi havis lakton, kaj ties haŭto estas tiom malmola, ke oni kutime faras ŝildojn el ĝi. Mi vidis alian, kiu havis la vizaĝon kaj la koloron de kamelo. Fine, post longa navigado, mi atingis Basora-n, kaj de tie mi revenis en tiun urbon Bagdado kun tiom da riĉaĵoj, ke mi ne konis ties amplekson. Mi ankoraŭ donis al la malriĉuloj grandan parton de miaj riĉaĵoj kaj mi aldonis aliajn terpecojn, al tiuj, kiujn mi jam akiris.

Sindbad tiel finis la historion pri sia tria vojaĝo. Li poste donigis cent aliajn zekinojn al Hindbad, invitante lin al la morgaŭa festeno kaj al la rakonto pri la kvara vojaĝo. Hindbad kaj la ĉeestantoj retiriĝis; kaj ĉar la posta tago revenis, Sindbad ekparolis ĉe la fino de la manĝo, kaj daŭrigis siajn aventurojn.

## Kvara vojaĝo de Sindbad la maristo

– La plezuroj, li diris, kaj la amuzoj, kiujn mi spertis post mia tria vojaĝo ne estis sufiĉe potencaj por determini min ne plu vojaĝi. Mi plian fojon lasis min allogi per la pasio komerci kaj vidi ion novan. Mi do ordigis miajn aferojn, kaj aĉetinte stokon da varoj por vendi en la lokoj, kien mi intencis vojaĝi, mi foriris. Mi ekvojis al Persio, kaj mi trairis plurajn ties provincojn, kaj mi atingis maran havenon, kie mi surŝipiĝis. Ni ekvelis kaj ni jam ankriĝis en pluraj havenoj de firma grundo kaj en kelkaj orientaj insuloj, kiam, iun tagon dum ni longe navigis, ventoŝtormo ektrafis nin, kio devigis la kapitanon ferli la velojn kaj doni ĉiujn necesajn ordonojn por eviti la danĝeron, kiu minacis nin. Sed ĉiuj niaj antaŭzorgoj estis vanaj; la manovro malbone sukcesis, la veloj estis disŝiritaj en mil pecojn, kaj ĉar ne plu eblis direkti la ŝipon, ĝi trafis rifojn kaj tiel rompiĝis, ke granda nombro da komercistoj kaj maristoj dronis kaj la varoj pereis...

Ŝeherazad atingis tiun punkton, kiam ŝi vidis la tagon aperi. Ŝi haltis kaj Ŝahriar leviĝis. La postan nokton, ŝi tiel ekrakontis la kvaran vojaĝon:

## 79-a nokto

– Mi havis la feliĉon, daŭrigis Sindbad, same kiel pluraj aliaj komercistoj kaj maristoj, alkroĉiĝi ĉe tabulo. Ni ĉiuj estis forportitaj per mara fluo ĝis insulo, kiu troviĝis antaŭ ni. Ni tie trovis fruktojn kaj fontan akvon, kiuj helpis nin por restarigi niajn fortojn. Ni eĉ ripozis tie dum la nokto en la loko, kien la maro eljetis nin, kaj ni ankoraŭ ne decidis tion, kion ni devos fari. La elĉerpiteco, kiu trafis nin pro nia malfeliĉaĵo malhelpis nin tion fari.

La postan tagon, tuj kiam la suno leviĝis, ni malproksimiĝis el la marbordo, kaj enirante en la insulon, ni tie ekvidis loĝejojn, kien ni iris. Ĉe nia alveno, Nigruloj venis al ni en tre granda nombro, ili ĉirkaŭis nin, kaptis nin kaj faris ian dispartigon, kaj poste kondukis nin en siajn domojn.

Oni kondukis nin, kvin el miaj kunuloj kaj min, en la saman lokon. Unue, oni sidigis nin, kaj oni proponis al ni iun herbon, kaj oni per signoj instigis nin manĝi da ĝi. Miaj kamaradoj ne atentante, ke la personoj, kiuj proponis tion ne manĝas ĝin, atentis nur la malsaton, kiu urĝigis ilin, ili avide impetis sur tiun manĝaĵon. Rilate min, danke al antaŭsento pri iu kaptilo, mi eĉ ne volis gustumi tion, kaj tio estis bona ideo, ĉar malmulte poste, mi konstatis, ke miaj kunuloj frezeziĝis, kaj ke kiam ili parolis al mi, ili ne sciis kion ili diris.

Oni poste proponis al ni rizon preparitan kun kokosoleo, kaj miaj kunuloj, kiuj ne plu havis racion, tre multe da ĝi manĝis. Ankaŭ mi manĝis da ĝi sed tre malmulte. La Nigruloj unue prezentis al ni tiun herbon por perturbi nian menson kaj danke al tio forpreni la ĉagrenon, kiun la malgaja kono de nia sorto devos kaŭzi; kaj ili donis al ni rizon por grasigi nin. Ĉar ili estis antropofagoj, ilia intenco estis manĝi nin, kiam ni iĝos grasaj. Ja tio okazis al miaj kamaradoj, kiuj ne konis sian destinon, ĉar ili perdis sian racion. Ĉar mi konservis la mian, vi bone komprenas, Senjoroj, ke anstataŭ grasiĝi kiel la aliaj, mi iĝis ankoraŭ pli magra ol mi antaŭe estis. La timo pri la morto, kiu senĉese minacis min, transformis en venenon ĉiujn alimentojn, kiujn mi glutis. Ektrafis min febleco, kiu fariĝis por mi tre utila: ĉar la Nigruloj batmortiginte kaj formanĝinte miajn kamaradojn tie haltis, kaj vidante min seka kaj senkarna, malsana, ili prokrastis mian morton al alia tempo.

Mi tamen ĝuis multe da libereco, kaj oni preskaŭ ne atentis pri miaj agoj. Tio ebligis al mi malproksimiĝi iun tagon de la domoj de la Nigruloj kaj forfuĝi. Iu oldulo ekvidis min komprenis mian intencion, kaj li kriis kontraŭ mi reveni per sia tuta forto; sed anstataŭ obei al li, mi plirapidis miajn paŝojn, kaj baldaŭ troviĝis ekster lia vido. Tiam nur tiu oldulo troviĝis en la domoj; ĉiuj aliaj Nigruloj forestis kaj devos reveni nur ĉe la fino de la tago, kion ili sufiĉe ofte kutimis fari. Pro tio, ĉar mi estis certa, ke ili ne plu kapablos reatingi min,

kiam ili ekscios pri mia forfuĝo, mi paŝis ĝis la nokto, kiam mi haltis por iomete ripozi kaj manĝi iun provianton, per kiu mi provizis min. Sed mi baldaŭ reekvojis kaj daŭre paŝis dum sep tagoj, evitante la lokojn, kiuj aspektis loĝataj. Mi vivis el kokosnuksoj, kiuj provizis min samtempe per trinkaĵo kaj manĝaĵo.

La okan tagon, mi atingis la maron kaj mi tuj ekvidis blankulojn kiel mi, okupatajn je la kolekto de pipro, kiu troviĝas ĉi tie en granda abundo. Ilia okupo estis por mi alloga, kaj mi tute trankvile alproksimigis ilin...

Ŝeherazad ne pli diris tiun nokton, kaj la postan ŝi tiel daŭrigis:

## 80-a nokto

La homoj, kiuj kolektis pipron, daŭrigis Sindbad, venis al mi. Tuj kiam ili vidis min, ili arabe demandis min, kiu mi estas, kaj de kie mi venas. Ĉar mi estis ravita aŭdi ilin paroli kiel mi, mi volonte kontentigis ilian scivolemon rakontante kiamaniere mi suferis ŝiprompiĝon kaj atingis tiun insulon, kie mi trafis en la manojn de la Nigruloj.

– Sed tiuj Nigruloj, ili diris al mi, manĝas la homojn! Danke al kiu miraklo vi eskapis ilian kruelecon?

Mi faris al ili la saman rakonton, kiun vi ĵus aŭdis kaj ili estis mirinde surprizataj.

Mi restis kun ili ĝis ili kolektis la kvanton da pipro, kiun ili volis; post kio ili surboatigis min sur la ŝipon, kiu kondukis ilin ĉi tien, kaj ni iris sur alian insulon, de kie ili venis. Ili prezentis min al sia reĝo, kiu estis bona princo. Li havis la paciencon aŭskulti la rakonton pri mia aventuro, kiu surprizis lin. Poste li havigis al mi vestaĵojn kaj ordonis, ke oni zorgu pri mi.

La insulo, kie mi troviĝis, estis dense loĝata kaj abundis je multaj aferoj, kaj en la urbo kie loĝis la reĝo okazis granda komercado. Tiu agrabla rifuĝejo komencis konsoli min pri mia malfeliĉo; kaj la bonfaroj, kiujn tiu malavara princo havis por mi finkontentigis min. Efektive, estis neniu alia, kiun li pli aprecis ol min, kaj konsekvence, estis neniu en lia kortego aŭ urbo, kiu ne provis plezurigi min. Tiel, oni baldaŭ konsideris min pli kiel homon naskiĝintan en ĉi tiu insulo, ol kiel fremdulon.

Mi rimarkis ion, kio aspektis por mi tre eksterordinara: ĉiuj, eĉ la reĝo, rajdas ĉevalon sen brido kaj sen piedingoj. Tio donis al mi la okazon demandi lin iun tagon kial Lia Moŝto ne uzas tiujn faciligaĵojn. Li respondis al mi, ke mi parolas al li pri aferoj, kies uzadon oni ne konas en liaj Ŝtatoj.

Mi tuj iris ĉe manlaboristo kaj petis lin prilabori lignaĵon laŭ la modelo de selo, kiun mi donis al li. Kiam la lignaĵo por la selo estis preta, mi mem provizis ĝin per remburajo kaj per ledon, kaj ornamis ĝin per ora brodaĵo. Mi poste turnis min al seruristo, kiu fabrikis por mi enbuŝaĵon laŭ la formo, kiun mi montris al li, kaj mi same fabrikigis piedingojn.

Kiam tiuj aferoj estis en perfekta stato, mi iris por prezenti ilin al la reĝo, kaj mi provis ilin sur unu el liaj ĉevaloj. Tiu princo grimpis sur la selon kaj estis tiom kontenta pri tiu invento, ke li atestis pri sia ĝojo per gravaj donacoj al mi. Mi ne povis malhelpi min fabrikigi plurajn selojn por liaj ministroj kaj por la ĉefaj oficistoj de lia domaro, kiuj ĉiuj multe donacis al mi, pro kio mi riĉiĝis en malmulte da tempo. Mi same fabrikis ilin por la eminentuloj de la urbo; kio akiris al mi grandan reputacion kaj ĉiuj bone konsideris min.

Ĉar mi regule frekventis la kortegon de la reĝo, li diris al mi iun tagon:

– Sindbad, mi amas cin, kaj mi scias, ke ĉiuj mia regatoj, kiuj konas cin, amas cin laŭ mia ekzemplo. Mi havas komplezon por peti de ci, kaj necesas, ke ci konsentos pri tio, kion mi petos de ci.

– Senjoro, mi respondis, estas nenio, kion mi ne pretas fari por pruvi mian obeemon al Via Moŝto; vi havas sur mi absolutan povon.

– Mi volas edzigi cin, respondis la reĝo, por ke tiu geedziĝo fiksiu cin en miaj Ŝtatoj, kaj por ke ci ne plu pensu pri cia patrolando.

Ĉar mi ne aŭdacis rezisti kontraŭ la volo de la princo, li donis al mi kiel edzinon iun damon el sia kortego, nobelan, belan, saĝan kaj riĉan. Post la nuptaj ceremonioj, mi establiĝis en la domo de la damo, kun kiu dum certa tempo mi vivis en perfekta harmonio. Tamen, mi estis ne tre kontenta pri mia situacio. Mia intenco estis eskapi ĉe la unua okazo kaj retroiri al Bagdado, ĉar mia pozicio, kiom ajn avantaĝa ĝi estis, ne kapablis forgesigi al mi ties memoron.

Mi troviĝis en tiuj sentoj, kiam la edzino de unu el miaj najbaroj, kun kiu mi tre profunde amikiĝis, ekmalsaniĝis kaj mortis. Mi iris ĉe li por konsoli lin kaj, trafante lin enmergita en la plej profunda afflikto:

– Dio konservu vin en bona sano, mi diris alpaŝante lin, kaj li donu al vi longan vivon!

– Ve! li respondis, kiel vi volas, ke mi ricevu la komplezon, kiun vi deziras al mi? Restas al mi nur unu horo por vivi.

– Ho! mi reekparolis, ne konservu en la menso tiom funebran ideon; mi esperas, ke tio ne okazos, kaj ke mi havos la plezuron havi vin kiel amikon dum ankoraŭ longa tempo.

– Mi deziras, li respondis, ke via vivo estu longedaŭra; rilate min, miaj aferoj estas ordigitaj kaj mi sciigas al vi, ke oni enterigas min hodiaŭ kun mia edzino. Tia estas la kutimo de niaj antaŭuloj en ĉi tiu insulo, kaj kiun ili neniam malobeis: la vivantan edzon oni enterigas kun la mortinta edzino, kaj la vivantan edzinon kun la mortinta edzo. Nenio kapablas savi min, ĉiu submetiĝas al tiu leĝo.

Dum li parolis al mi pri tiu stranga barbareco, kies kono tre kruele timigis min, la parencoj, la amikoj kaj la najbaroj ope alvenis por ĉeesti la enterigon. Oni vestis la kadavron de la virino per ŝiaj plej riĉaj vestaĵoj, same kiel dum ŝia geedziĝa tago, kaj oni ornamis ŝin per ĉiuj ŝiaj juveloj.

Oni poste forportis ŝin en malkovrita ĉerko, kaj la funebraro ekpaŝis. La edzo troviĝis ĉekape de la procesio kaj sekvis la korpon de sia edzino. Ni direktis nin al alta monto, kaj kiam oni atingis ĝin, oni

levis pezan ŝtonon, kiu kovris la aperturon de profunda puto kaj oni tien malsuprenigis la kadavron, forpreninte nenion el ties vestaĵoj kaj juveloj. Post tio, la edzo kisis siajn parencojn kaj siajn amikojn, kaj lasis sin senreziste enĉerkiĝi, kun pota da akvo kaj sep panetoj apud si; poste oni malsuprenigis lin sammaniere kiel oni malsuprenigis lian edzinon. La monto etendiĝis laŭ longeco kaj ĝi estis la limo de la maro, kaj la puto estis tre profunda. Kiam finiĝis la ceremonio, oni relokis la ŝtonon sur la aperturon.

Ne necesas, Senjoroj, diri al vi, ke mi estis tre malĝoja atestanto de tiu enterigo. Ĉiuj aliaj personoj, kiuj ĉeestis aspektis preskaŭ ne emociigitaj, pro la kutimiĝo ofte spekti la saman aferon. Mi ne povis malhelpi min diri al la reĝo tion, kion mi opinias pri tio :

– Senjoro, mi diris al li, mi tre miras pri la stranga kutimo, kiun oni havas en viaj Ŝtatoj enterigi la vivantojn kun la mortintoj. Mi multe vojaĝis, mi frekventis homojn de senfina nombro da nacioj, kaj mi neniam aŭdis pri tiom kruela leĝo.

– Kion ci volas, Sindbad? respondis la reĝo, tio estas komuna leĝo, kaj mi mem devas submetiĝi al ĝi: oni enterigos min vivanta kun la reĝino mia edzino, se ŝi mortos la unua.

– Sed Senjoro, mi diris, ĉu mi aŭdacos demandi Vian Moŝton, ĉu la fremduloj nepre devas respekti tiun kutimon?

– Sendube, respondis la reĝo ridetante pro la motivo de mia demando, ili ne troviĝas ekster ĝi, kiam ili edziĝis en ĉi tiu insulo.

Mi triste retrohejmeniĝis kun tiu respondo. La timo, ke mia edzino mortos la unua, kaj ke oni enterigos min vivanta kun ŝi donis al mi tre malgajajn pensadojn. Tamen, kiun rimedon proponi kontraŭ tia malbono? Necesis pacienci kaj konfidi min je la volo de Dio. Tamen mi tremis pro la plej malgrava malsaneto, kiun mi rimarkis en mia edzino; sed, ve! min baldaŭ trafis vera timo. Ŝi vere ekmalsaniĝis, kaj mortis post malmulte da tagoj...

Ĉe tiuj vortoj, Ŝeherezad finis sian paroladon por tiu ĉi nokto. La postan tagon, ŝi tiamaniere retrovis la sekvon:

## 81-a nokto

– Imagu mian doloron, daŭrigis Sindbad: esti vivanta enterigita ŝajnis al mi ne malpli bedaŭrinda fino ol esti vorata de antropofagoj; tamen necesis travivi tion. La reĝo akompanata de sia tuta kortego volis honori per sia persono la funebrantaroon, kaj la plej eminentaj personoj de la urbo same honoris min ĉeestante mian enterigon.

Kiam ĉio estis preta por la ceremonio, oni metis la korpon de mia edzino en ĉerkon kun ĉiuj ŝiaj juveloj kaj ŝiaj plej belaj vestaĵoj. Oni ekpaŝis. Estiel la dua aktoro de tiu bedaŭrinda tragedio, mi senpere sekvis la ĉerkon de mia edzino, kun okuloj plenaj je larmoj kaj bedaŭranta mian malfeliĉan destinon. Antaŭ ol atingi la monton, mi volis provi ion por konvinki la ĉeestantojn. Mi unue alparolis la reĝon, poste ĉiujn, kiuj troviĝis ĉirkaŭ mi; kaj kliniĝante antaŭ ili ĝis la tero por kisi la randon de ilia vestaĵo, mi petegis ilin kompati min:



– Konsideru, mi diris, ke mi estas fremdulo, kiun oni ne devas submeti al tiom rigora leĝo, kaj ke mi havas alian edzinon<sup>11</sup> kaj infanojn en mia lando.

Per kiom ajn tuŝanta mieno mi prononcis tiujn parolojn, neniu estis kortuŝata; male, oni rapidis malsuprenigi la korpon de mia edzino en la puton, kaj oni tien malsuprenigis min post momento en alia malkovrita ĉerko, kun vazo plena je akvo kaj sep panoj. Fine tiu tiom mortiga por mi ceremonio finiĝis, oni remetis la ŝtonon sur la aperturon de la puto, spite la eksceson de mia doloro kaj de miaj kompatindaj krioj.

Dum mi laŭgrade alproksimiĝis al la fundo, mi malkovris, danke al la malmulto da lumo, kiu fontis elsupre, la disponon de tiu subtera loko. Ĝi estis tre vasta groto, kiu facile ampleksis kvindek klaftojn en profundeco. Mi baldaŭ flaris neelporblan fetoron, kiu fontis el sennombraj kadavroj, kiujn mi vidis dekstre kaj maldekstre; mi eĉ kredis aŭdi kelkajn el la lastaj, kiujn oni malsuprenigis vivantaj, eligi lastajn vespirojn. Tamen, kiam mi troviĝis malsupre, mi rapide eliris el la ĉerko kaj malproksimiĝis el la kadavroj, ŝtopante mian nazon. Mi ĵetis min surteren, kie mi longe restis plorante. Tiam, pripensante pri mia malfeliĉa sorto :

– Vere estas, mi diris, ke Dio disponas pri ni laŭ la dekretoj de sia providenco; sed, kompatinda Sindbad, ĉu ne estas pro cia kulpo, ke ci vidas cin preta morti tiom strangan morton? Pli plaĉus al Dio, ke ci mortu okaze de unu el tiuj ŝiprompiĝoj, el kiuj ci savis cin! ci ne devus morti pro tiom longa kaj terura morto en ĉiuj siaj detaloj. Sed ci gajnis tion pro cia malbenita avareco. Ha! kompatindulo! ĉu ci prefere ne devus resti hejme kaj trankvile ĝui la frukton de ciaj laboroj?

Tiaj estis la neutilaj plendoj, per kiuj mi reeĥigis la groton, frapante mian kapon kaj ventron pro rabio kaj malespero, kaj tute allasante min al la plej affliktantaj pensoj. Tamen (ĉu mi diros tion al vi?) anstataŭ voki la morton helpe al mi, kiom ajn kompatinda mi estis, la amo al la vivo plu akriĝis en mi, kaj instigis min daŭrigi miajn tagojn. Mi blindopalpe iris, ŝtopante mian nazon, por preni la panon kaj la akvon, kiu troviĝis en mia ĉerko kaj iomete manĝis.

Kvankam la obskuro, kiu regis en la groto, estis tiom densa, ke ne eblis apartigi la tagon de la nokto, mi tamen retrovis mian ĉerkon; kaj ŝajnis al mi, ke la groto estas pli vasta kaj pli plena je kadavroj ol ĝi unue aspektis al mi. Mi vivis dum kelkaj tagoj per mia pano kaj akvo; sed fine, ĉar ne plu restis da ĝi, mi preparis min morti...

Ŝeherazad ĉesis paroli post tiuj lastaj vortoj. La postan nokton, ŝi tiamaniere reekparolis:

<sup>11</sup> Ĉar Sindbad estas mahometano, li rajtas havi plurajn edzinojn.

## 82-a nokto

Mi atendis nur la morton, daŭrigis Sindbad, kiam mi aŭdis, ke oni levas la ŝtonon. Oni malsuprenigis kadavron kaj unu vivantan personon. La mortinto estis viro. Estas normale elekti ekstremajn decidojn en la plej gravaj situacioj. Dum oni malsuprenigis la virinon, mi alproksimiĝis al la loko, kie oni devos meti ŝian ĉerkon, kaj kiam mi vidis, ke oni refermas la aperturon de la puto, mi frapis la kapon de la kompatindulino per du aŭ tri battoj de dika ostoj, kiun mi plukis. Ŝi duone senkonsciiĝis pro tio, aŭ pli precize mi batmortigis ŝin, kaj, ĉar mi faris tiun malhumanaĵon nur por profiti la panon kaj la akvon, kiuj troviĝis en la ĉerko, mi havis provianton por kelkaj tagoj. Fine de tiu tempo, oni ankoraŭ malsuprenigis mortintan virinon kaj vivantan viron: mi sammaniere mortigis la viron, kaj, ĉar feliĉe por mi, tiam okazis iuspeca febro en la urbo, ne mankis al mi provianto daŭre uzante la saman sistemon.

Iun tagon, kiam mi denove ĵus mortigis iun virinon, mi aŭdis spiri kaj paŝi. Mi iris en la direkto, de kie fontas la bruo; mi aŭdis, ke oni pli forte spiras laŭ mia alproksimiĝo, kaj ŝajnis al mi, ke mi vidas ion, kio forfuĝas. Mi sekvis tiun similon de ombro, kiu de tempo al tempo haltis, kaj daŭre spiris fuĝante dum mi alproksimiĝis. Mi tiom longe postsekvis ĝin, kaj mi tiom foren iris, ke mi fine ekvidis iun lumon, kiu similis stelon. Mi plu paŝis direkte al tiu lumo, kelkfoje perdante ĝin laŭ la obstakloj, kiuj kaŝis ĝin de mi, sed mi ĉiam retrovis ĝin, kaj fine mi malkovris, ke ĝi aperas tra aperturo de la roko, sufiĉe larĝa, por ke eblus traŝoviĝi.

Ĉe tiu malkovro mi momente haltis por rekonsciiĝi post tiu potenca emocio, kiun mi ĵus spertis; poste, alpaŝinte tiun aperturon, mi trairis ĝin kaj trovis min apud la maro. Imagu la eksceson de mia ĝojo. Ĝi estis tiom forta, ke mi havis malfacilecon konvinki min, ke tio ne estas sonĝo. Kiam mi konvinkiĝis, ke tio estas la vero, kaj kiam miaj sensoj retrovis sian kutiman staton, mi komprenis, ke tio, kion mi aŭdis spiri, kaj kion mi sekvis estas animalo elirinta el la maro, kiu kutimas eniri la groton kaj tie satiĝi per la mortintaj korpoj.

Mi konsideris la monton kaj rimarkis, ke ĝi situas inter la urbo kaj la maro, sen rilato per iu vojo, ĉar ĝi estas tiom kruta, ke la naturo igis ĝin ne alirebla. Mi kliniĝis sur la bordo por danki Dion pro la favoro, kiun li ĵus okazigis al mi. Mi poste reeniris en la groton por preni tie panon, kiun mi manĝis revene al la taglumo per pli bona apetito ol mi tion faris, ekde kiam oni enterigis min vivanta en tiu obskura loko.

Mi denove iris tien kaj palpe komencis kolekti en la ĉerkoj ĉiujn diamantojn, rubenojn, perlojn, orajn braceletojn kaj fine ĉiujn riĉajn ŝtofojn, kiujn mi trovis sub mia mano; mi portis ĉion tion sur la marbordon. El ili mi preparis plurajn pakojn, kiujn mi zorge ligis per ŝnuregoj, kiujn oni uzis por malsuprenigi la ĉerkojn, kaj kiuj troviĝis tie en granda kvanto. Mi lasis ilin sur la bordo atendente

taŭgan okazon, ne timante, ke la pluvo difektos ilin, ĉar tiam ne estis la pluvsezono.

Post du aŭ tri tagoj, mi ekvidis ŝipon, kiu ĵus eliris el la haveno, kaj kiu venis sufiĉe proksime al la loko, kie mi troviĝis. Mi signis per la tolo de mia turbano, kaj mi kriis per mia tuta forto, por ke oni aŭdu min. Oni aŭdis min kaj oni malligis barkon por veni al mi. Ĉe la demando, kiun la maristoj metis al mi, pro kiu malfeliĉo mi troviĝas en tiu loko, mi respondis, ke mi saviĝis el ŝiprompiĝo de du tagoj kun la varoj, kiujn ili vidas. Feliĉe por mi, tiuj homoj ne ekzamenante la lokon, kie mi estas kaj ĉu tio, kion mi diras al ili estas verŝajna, ili kontentiĝis je mia respondo kaj forprenis min kun miaj pakoj.

Kiam ni atingis la ŝipon, la kapitano kontenta en si mem pro la plezuro, kiun li okazigis al mi kaj zorgata pri la komandado de sia ŝipo, same havis la bonecon kontentiĝi per la rakonto de mia laŭdira ŝiprompiĝo. Mi prezentis al li kelkajn el miaj juveloj, sed li ne volis akcepti ilin.

Ni preternavigis kelkajn insulojn, kaj inter aliaj, la insulon de la Sonoriloj<sup>12</sup>, fora je dek tagoj de la insulo Serendib<sup>13</sup> kun ordinara kaj neforta vento, kaj je ses tagoj el la insulo Kela<sup>14</sup>, kie ni albordiĝis. Tie troviĝas plumbaj minejoj, indiaj kanoj<sup>15</sup> kaj tre bonkvalita kamforo. La reĝo de la insulo Kela estas tre riĉa, tre potenca, kaj lia potenco etendiĝas sur la tutan insulon de la Sonoriloj, kiu ampleksas du tagojn da irado, kaj kies loĝantoj estas ankoraŭ tiom barbaraj, ke ili manĝas homan karnon. Farinte grandskalan komercon en tiu insulo, ni denove ekvelis kaj albordiĝis en plurajn aliajn havenojn. Fine, mi feliĉe atingis Bagdadon kun senlimaj riĉaĵoj, kies valoron mi ne bezonas detali al vi. Por danki Dion pro la favoroj, kiujn li okazigis al mi, mi malavare donis almozojn, tiom por la prizorgado de pluraj moskeoj, kiom por la vivteno de la malriĉuloj, kaj tute dediĉis min al miaj parencoj kaj al miaj amikoj, amuziĝante kaj festenante kun ili.

Sindbad finis en tiu momento la rakonton pri sia kvara vojaĝo, kiu ankoraŭ pli vekis la admiron de la aŭskultantoj ol la tri antaŭaj. Li denove donacis cent zekinojn al Hindbad, kiun li petis, same kiel la aliajn, reveni la postan tagon, je la sama horo, por tagmanĝi en lia domo kaj aŭskulti la detalojn pri lia kvina vojaĝo. Hindbad kaj la aliaj invititoj ĝisis lin kaj retiriĝis. La postan tagon, kiam ili ĉiuj kuniĝis, ili ĉetabliĝis kaj fine de la manĝo, kiu daŭris ne malpli longe ol la aliaj, Sindbad tiamaniere komencis la rakonton pri sia kvina vojaĝo.

<sup>12</sup> Malnova nomo de iu el la insuloj de la India Oceano.

<sup>13</sup> Aŭ insulo Cejlono – nun Sri Lanka.

<sup>14</sup> Aŭ Kalah, komerca haveno situanta en nuna Malajzio.

<sup>15</sup> Nomo de floro alie nomata balisio aŭ kanna.

## Kvina vojaĝo de Sindbad la maristo

La plezuroj, li diris, havis ankoraŭ sufiĉe da ĉarmoj por forviŝi el mia memoro ĉiujn penojn kaj suferojn, kiujn mi travivis, kaj tamen ili ne kapablis forpreni de mi la emon fari novajn vojaĝojn. Pro tio, mi aĉetis varojn, mi pakigis ilin kaj ŝarĝigis ilin sur veturilojn, kaj mi foriris kun ili por atingi la unuan maran havenon. Tie, por ne dependi de kapitano, kaj por havi ŝipon sub mia komando, mi donis al mi la eblon konstruigi unu kaj proprakoste ekipi ĝin. Tuj kiam ĝi estis finkonstruita, mi ŝarĝigis ĝin kaj mi enŝipiĝis, kaj ĉar mi ne havis sufiĉe da kargo por plenŝtopi ĝin, mi akceptis plurajn komercistojn el diversaj nacioj kun iliaj varoj.

Ni ekvelis okaze de la unua favora vento kaj atingis la marmezon. Post longa navigado, la unua loko, kie ni alboridiĝis estis senhoma insulo, kie ni trafis la ovon de la birdo rok de grandeco simila al tiu, pri kiu vi jam aŭdis min; ĝi entenis rokidon pretan eloviĝi. Ĝia beko komencis aperi...

Ĉe tiuj vortoj, Ŝeherezad ekmutis, ĉar la taglumo jam aperis en la apartamento de la sultano de Indioj. La postan nokton, ŝi reekparolis.

### 83-a nokto

Sindbad la maristo, ŝi diris, daŭrigis per la rakonto de sia kvina vojaĝo:

– La komercistoj, li daŭrigis, kiuj surŝipiĝis sur mian ŝipon, kaj kiuj metis la piedon sur la teron kun mi, frakasis la ovon per pezaj hakilaj batoj, kaj faris aperturon, tra kiu ili eltiris la rokidon popece, kaj rostis ĝin. Mi serioze avertis ilin ne tuŝi la ovon, sed ili ne volis obei min.

Ili apenaŭ finis la festenon, kiun ili ĵus donis al si, kiam aperis en la aero, sufiĉe fore de ni, du grandaj nuboj. La kapitano, kies laboron mi luprenis kontraŭ salajro, por gvidi mian ŝipon, sciante el propra sperto kion tio signifas, ekkriis, ke estas la patro kaj la patrino de la rokido. Li urĝis nin resurŝipiĝi kiel eble plej rapide, por eviti la malfeliĉon, kiun li antaŭvidis. Ni diligente obeis lian konsilon, kaj haste ekvelis.

Dume, ambaŭ rok-oj alflugis eligante terurajn kriojn, kiuj duobl-iĝis, kiam ili vidis la staton, en kiu ni lasis la ovon, kaj kiam ili konstatis, ke la ido ne plu estas en ĝi. Por venĝi sin, ili forflugis direkte al la flanko, de kie ili venis, kaj malaperis kelkan tempon, dum kiu ni rapidis per niaj veloj por malproksimiĝi kaj antaŭzorgi pri tio, kio nepre okazos al ni.

Ili revenis kaj ni rimarkis, ke ili ĉiuj tenas en siaj krifoj pecon de roko de enorma grandeco. Kiam ili troviĝis precize super mia ŝipo, ili haltis kaj, subtenante sin en la aero, unu el ili faligis la rokpecon, kiun ĝi tenis, sed danke al la lerteco de nia rudristo, kiu flanken-

irigis la ŝipon, ĝi ne falis sur nin. Ĝi falis apude, en la maron, kiu tiamaniere faŭkiĝis, ke ni preskaŭ vidis ties fundon. La alia birdo, bedaŭrinde por ni, faligis sian rokon tiom precize en la mezon de la ŝipo, ke tiu rompiĝis kaj frakasiĝis en mil pecojn. La maristoj kaj la pasaĝeroj tuj estis dispremitaj pro la bato aŭ dronis. Mi mem dronis, sed revenante sur la nivelon de la akvo, mi feliĉe alkroĉiĝis al peco de rompitaĵo. Tiel, helpante min ĉu per unu mano, ĉu per la alia, ne ellasante tion, al kio mi alkroĉiĝis, danke al la vento kaj la fluo, kiuj favoris min, mi fine atingis iun insulon, kies bordo estis tre kruta. Mi tamen superis tiun malfacilaĵon kaj forkuris.

Mi sidiĝis sur la herbon por iomete reakiri miajn fortojn, post kio mi leviĝis kaj eniris en la insulo por skolti la terenon. Ŝajnis al mi, ke mi troviĝas en delica ĝardeno: mi ĉie vidis arbojn, unuj kovritajn per verdaj fruktoj kaj aliajn per maturaj, kaj rojojn kun nesalita kaj klara akvo, kiu agrable zigzagis. Mi manĝis el tiuj fruktoj, kiujn mi taksis bongustegaj, kaj mi trinkis el tiu akvo, kiu allogis min.

Kiam alvenis la nokto, mi kuŝiĝis sur la herbon, en sufiĉe komforta loko; sed mi dormis ne tutan horon kaj mia dormo estis ofte interrompita pro la timo vidi min sola en tiom senhoma loko. Tial, mi uzis la pli grandan parton de la nokto por ĉagreniĝi kaj riproĉi al mi la mankon de singardo, kiun mi havis ne restante hejme anstataŭ entrepreni tiun lastan vojaĝon. Tiuj pripensoj tiom foren kondukis min, ke mi komencis formi projekton kontraŭ mia propra vivo; sed la tago, danke al sia lumo, malaperigis mian malesperon. Mi leviĝis, kaj paŝis inter la arboj, sed kun ia antaŭtimo.

Kiam mi troviĝis iomete interne de la insulo, mi ekvidis oldulon, kiu ŝajnis al mi tre kurbiĝinta. Li sidis apud rojo; mi unue imagis, ke li estas iu, kiu suferis ŝiprompon same kiel mi. Mi proksimiĝis al li, salutis, li faris nur inklinon per la kapo. Mi demandis lin kion li faras ĉi tie; sed anstataŭ respondi al mi, li signis al mi preni lin sur miajn ŝultrojn kaj transirigi lin sur la alian bordon de la rojo, komprenigante al mi, ke tio estas por iri kaj pluki fruktojn.

Mi kredis, ke li bezonas mian helpon; pro kio, metinte lin sur mian dorson, mi travadis la rojon.

– Malgrimpu, mi tiam diris al li, kliniĝante min por faciligi lian desupradon.

Sed anstataŭ desupri al la grundo (mi nun ankoraŭ ridas pri la afero ĉiufoje, kiam mi rememoras tion), tiu oldulo, kiu ŝajnis al mi tute kaduka facile metis ĉirkaŭ mian kolon siajn du krurojn, kaj mi vidis, ke ilia haŭto similas tiun de bovino. Li rajde sidiĝis sur miajn ŝultrojn, tiom streĉe premante mian gorgon, ke ŝajne, li volas strangoli min. Timo ektrafis min en tiu momento kaj mi svene falis....

Ŝeherazad estis devigata halti ĉe tiuj paroloj pro la taglumo, kiu aperis. Ŝi tiamaniere daŭrigis sian rakonton ĉe la fino de la posta nokto:

## 84-a nokto

– Spite mian svenon, diris Sindbad, la ĝena oldulo daŭre restis kroĉita ĉe mia kolo; li nur iomete disigis siajn krurojn por ebligi al mi rekonsciiĝi. Kiam mi reakiris mian konscion, li forte premis sur mian ventron unu el siaj piedoj, kaj per la alia forte batante mian flankon, li devigis min leviĝi kontraŭ mia volo. Kiam mi staris, li irigis min sub la arbojn; li devigis min halti por pluki kaj manĝi la fruktojn, kiujn ni trafis. Li ne lasis min dumtage, kaj kiam mi volis ripozi dum la nokto, li sterniĝis kun mi sur la tero, daŭre alkroĉita al mia kolo. Ĉiujn matenojn, li nepre puŝis min por vekigi min, poste li instigis min leviĝi kaj paŝi premante min per siaj piedoj. Imagu, Senjoroj, la penon, kiun mi spertis kun tiu pezo kaj ne kapablante forigi ĝin.

Iun tagon, mi trovis sur mia vojo plurajn sekajn kalabasonojn, kiuj falis desur arbo, kiu kreskigis ilin, mi prenis unu sufiĉe grandan, kaj bone puriginte ĝin, mi premis en ĝin la sukcon de pluraj vitaj grapoloj, frukto, kiun la insulo abunde kreskis, kaj kiun ni trafis ĉiupaŝe. Kiam mi plenigis per ĝi la kalabason, mi metis ĝin en lokon, kien mi ruze instigis la oldulon konduki min plurajn tagojn poste. Tie, mi plukis la kalabason, kaj metante ĝin ĉe mia buŝo, mi trinkis bonegan vinon, kiu forgesigis al mi por kelka tempo, la mortan ĉagrenon, kiu plagis min. Tio donis al mi viklecon, mi eĉ estis tiom ĝojigita, ke mi komencis kanti kaj salti dumpaŝe.

La oldulo, kiu konsciis pri la efiko, kiun tiu trinkaĵo havis sur mi, kaj ke mi portis lin pli facile ol kutime, signis al mi, por ke mi donu iom por trinki: mi proponis al li la kalabason. Li prenis ĝin, kaj ĉar la trinkaĵo aperis al li agrabla, li glutis ĝin ĝis la lasta guto. Estis sufiĉe da ĝi por ebriigi lin: tial li ebriiĝis kaj baldaŭ la vina alkoholaĵo atingis lian kapon, li komencis kanti laŭ sia maniero kaj salteti sur miaj ŝultroj. La skuoj, kiujn li faris, elvomigis tion, kion li havis en la stomako, kaj liaj kruroj iom post iom malstreĉiĝis, tiel ke, vidante, ke li ne plu premas min, mi terenfaligis lin kaj li restis senmova. Tiam mi plukis tre dikan ŝtonon kaj frakasis lian kapon per ĝi.

Mi spertis grandan ĝojon, ĉar mi por ĉiam liberiĝis je tiu malbenita oldulo, kaj mi paŝis al la bordo de la maro, kie mi renkontis homojn el ŝipo, kiuj ĵus ankriĝis por provizi sin per akvo kaj survoje pluki kelkajn refreŝigojn. Ili estis ege surprizitaj vidi min kaj aŭdi la detalojn de mia aventuro.

– Vi trafis, ili diris al mi, en la manoj de la mara oldulo, kaj vi estas la unua, kiun li ne strangolis; li neniam forlasis tiujn, kies mastro li fariĝis nur, post kiam li sufokis ilin; kaj li famigis tiun insulon pro la nombro da personoj, kiujn li mortigis: la maristoj kaj la komercistoj, kiuj tie alboridiĝis, aŭdacis enpenetri ĝin nur kun forta kompanio.

Informinte min pri tiuj aferoj, ili prenis min kun si sur sian ŝipon, kies kapitano ĝojis akcepti min, post kiam li eksciis ĉion, kio okazis

al mi. Li reekvelis kaj post kelkaj tagoj da navigado, ni atingis la havenon de granda urbo, kies domoj estis konstruitaj el bonkvalitaj ŝtonoj.

Unu el la komercistoj de la ŝipo, kiu amikiĝis kun mi, devigis min akompani lin, kaj kondukis min en loĝejon destinitan por akcepti la fremdajn komercistojn. Li donis al mi grandan sakon, kaj poste, rekomendinte min al kelkaj urbaj homoj, kiuj havis sakon kiel mi kaj petinte ilin preni min kun si por kolekti kokosnuksojn:

– Iru, li diris al mi, sekvu ilin, faru tion, kion vi vidis ilin fari, ne deflankiĝu de ili, ĉar vi endanĝerigus vian vivon.

Li donis al mi provianton por la tago kaj mi foriris kun tiuj homoj.

Ni atingis vastan arbaron el tre altaj kaj tre rektaj arboj, kaj kies trunko estis tiom glata, ke ne eblis grimpi por atingi la branĉojn, kie troviĝas la fruktoj. Ĉiuj tiuj arboj estis kokosarboj, kies fruktojn ni deziris faligi kaj plenigi per ili niajn sakojn. Enirante en la arbaron, ni vidis ampleksan nombron da grandaj kaj malgrandaj simioj, kiuj ekfuĝis, tuj kiam ili ekvidis nin, kaj kiuj grimpis ĝis la supro de la arboj kun nekredebla lerteco...

Ŝeherazad deziris daŭrigi, sed vidiĝis la taglumo, kiu ekaperante malebligis tion. La postan nokton, ŝi tiamaniere reekrakontis:

## 85-a nokto

– La komercistoj, kun kiuj mi estis, daŭrigis Sindbad, plukis ŝtonojn kaj svingis ilin per sia tuta forto ĝis la supro de la arboj, kontraŭ la simioj. Mi imitis ilian ekzemplon, kaj mi vidis, ke la simioj komprenantaj nian celon, plukis la kokosnuksojn kun ardo kaj ĵetis ilin al ni per gestoj, kiuj montris ilian koleron kaj incitecon. Ni plukis la nuksojn kaj ni de tempo al tempo ĵetis ŝtonojn por inciti la simiojn. Danke al tiu ruzo, ni plenigis niajn sakojn per tiu frukto, kiun ni ne kapablas kolekti alimaniere.

Kiam niaj sakoj estis plenaj, ni retroiris al la urbo, kie la komercisto, kiu sendis min al la arbaro donis al mi la valoron de la sako kun la kokosnuksoj, kiujn mi alportis.

– Daŭrigu, li diris, kaj iru ĉiutage por fari la samon, ĝis vi lukros sufiĉe por retroiri en vian landon.

Mi dankis lin pro la bona konsilo, kiun li donis al mi, kaj iom post iom, mi tiom multe da kokosnuksoj amasigis, ke mi havis da ili por grandega sumo.

La ŝipo, sur kiu mi venis jam ekvelis kun la komercistoj, kiuj ŝargis ĝin per kokosnuksoj, kiujn ili aĉetis. Mi atendis la alvenon de alia, kiu baldaŭ alordiĝis en la havenon de la urbo por akiri la saman ŝargon. Mi ŝargigis sur ĝin ĉiujn kokosnuksojn, kiuj apartenis al mi, kaj kiam ĝi estis preta fornavigi, mi iris por adiaŭi la komerciston, al kiu mi ŝuldis tiom da dankemo. Li ne povis surboatiĝi kun mi, ĉar li ankoraŭ ne finis sian negocon.

Ni ekvelis kaj direktis nin al la insulo, kie la pipro kreskas en plej

granda abundo. De tie ni atingis la insulon Komari<sup>16</sup>, kie kreskas la plej fajna specio de aloa ligno, kaj kies loĝantoj faris al si nerompblan leĝon ne trinki vinon kaj toleri neniun lokon por diboĉo. Mi interŝanĝis miajn kokosnuksojn en tiuj du insuloj kontraŭ pipro kaj aloa ligno<sup>17</sup>, kaj iris kun aliaj komercistoj al la perla plukado, kie mi luis plonĝistojn por mi mem. Ili plukis grandan nombron da perloj por mi, tre dikaj kaj tute perfektaj. Mi resurmariĝis kun ĝojo sur ŝipo, kiu feliĉe atingis Basora-n. De tie mi revenis al Bagdado, kie mi ricevis grandajn monajn sumojn kontraŭ la pipro, la aloa ligno kaj la perloj, kiujn mi alportis. Mi disdonis en almozoj la dekan parton<sup>18</sup> de mia profito, same kiel, kiam mi revenis el miaj aliaj vojaĝoj, kaj mi provis ripozi post miaj lacoj en ĉiuspecaj amuzoj.

Findirinte tiujn parolojn, Sindbad donigis cent zekinojn al Hindbad, kiu retiriĝis kun ĉiuj aliaj invititoj. La postan tagon, la sama kompanio troviĝis en la domo de la riĉa Sindbad, kiu regalinte ĝin kiel la antaŭajn tagojn, petis atenton kaj rakontis sian sesan vojaĝon laŭ la maniero, kiun mi tuj diros al vi.

## Sesa vojaĝo de Sindbad la maristo

– Senjoroj, li diris al ili, vi certe malbone komprenas kiel, post kvin ŝiprompiĝoj kaj spertinte tiom da danĝeroj, mi ankoraŭ kapablis denove decidi novan hazardan vojaĝon kaj serĉi novajn malfeliĉojn. Mi mem miras pri tio, kiam mi pripensas la aferon, kaj certe mia destino pelis min tien. Kio ajn estas, post unu jaro da ripozo, mi preparis min por sesa vojaĝo, spite la preĝojn de miaj parencoj kaj de miaj amikoj, kiuj faris sian eblon por reteni min.

Anstataŭ ekvoji tra la Persa golfo, mi plian fojon trairis plurajn provincojn de Persio kaj de Indioj kaj mi atingis maran havenon, kie mi surŝipiĝis sur bonan ŝipon, kies kapitano decidis fari longan navigadon. Ĝi vere fariĝis tre longa, sed samtempe tiom malfeliĉa, ke la kapitano kaj la piloto perdis sian vojon tiel, ke ili ne plu sciis, kie ni troviĝas. Ili fine retrovis ĝin, sed ni, ĉiuj pasaĝeroj, ne havis kaŭzon por ĝoji pro tio, kaj iun tagon ni estis tre mirigitaj vidi la kapitanon forlasi sian postenon eligante kriojn. Li ĵetis sian turbanon sur la ferdekon, elŝiris sian barbon kaj frapis sian kapon kiel homo, kies menson perturbis la malespero. Ni demandis lin kial li tiom afliktiĝas:

– Mi anoncas al vi, li respondis, ke ni troviĝas en la loko la plej danĝera de la tuta maro. Tre rapida mara fluo forportas la ŝipon kaj ni ĉiuj pereos post malpli ol kvaronhoru. Preĝu Dion, por ke li liberigu nin de tiu danĝero. Ni ne kapablos saviĝi se li ne kompatos nin.

<sup>16</sup> Tio estas la insuloj Komoroj aŭ la duoninsulo post la Gango, kiu finiĝas per la kabo Komorin.

<sup>17</sup> Tiu ligno donas amaran rezinon uzatan kiel laksigilon aŭ kiel tinkturan substancan.

<sup>18</sup> Unu el la devigoj de la muzulmana kredo: la rita almozo al la malriĉuloj.



Ĉe tiuj paroloj, li ordonis faldi la velojn, sed la ŝnuroj rompiĝis dum la manovro, kaj la ŝipo sen ebla kontraŭa rimedo, estis forportita de la fluo ĝis la piedo de nealirebla monto, kie ĝi tuŝis la teron kaj rompiĝis, tamen laŭ maniero, kiu savis niajn vivojn kaj lasis al ni tempon por malŝarĝi nian provianton kaj niajn plej valorajn varojn.

Farinte tion, la kapitano diris al ni:

– Dio ĵus faris tion, kio plaĉis al li. Ni povas fosi ĉi tie ĉiu nian tombon, kaj interŝanĝi nian lastan adiaŭon, ĉar ni troviĝas en tiom pereiga loko, ke neniu el la homoj, kiuj trafis ĝin antaŭ ni revenis hejmen.

Tiuj paroloj ĵetis nin en mortan aflikon kaj ni interbrakumis kun larmoj en la okuloj, priplorante nian kompatindan sorton.

La monto, ĉepiede de kiu ni troviĝis konsistigis la bordon de tre longa kaj tre vasta insulo. Tiu bordo estis tute kovrita per pecoj de ŝipoj, kiuj ĉi tie rompiĝis, kaj per senfino da ostoj, kiujn oni trafis ie tie. Ili hororigis nin, ĉar ni taksis, ke ĉi tie pereis multe da homoj. La kvanto da varoj kaj da riĉaĵoj, kiuj ĉie aperis sub niaj okuloj estis preskaŭ nekredibla. Ĉiuj tiuj objektoj nur pliigis nian konsternon. Ĉie alie la riveroj eliras el sia fluejo por atingi la maron, ĉi tie tute kontraŭe, granda nesalita rivero foriras el la maro kaj eniras en la bordon tra obskura groto, kies aperturo estas ege alta kaj larĝa.

Kio plej rimarkindas en ĉi tiu loko estas, ke la ŝtonoj de la monto konsistas el kristalo, el rubeno aŭ el aliaj valoraj ŝtonoj. Eblas ankaŭ vidi tie la fonton de iuspeca peĉo aŭ bitumo, kiu fluas en la maron. La fiŝoj glutas tion kaj poste elvomas ĝin ŝanĝitan al griza ambro, kiun la ondoj forĵetas sur la strandon, kiu estas kovrita per ĝi. Same tie kreskas arboj, kiuj plejparte estas el aloa ligno, kiuj el beleca vidpunkto estas tiaj valoraj, kiaj tiuj de Komari.

Por fini la priskribon de tiu loko, kiun eblas nomi abismo, ĉar neniam io revenas el ĝi, ne eblas por la ŝipoj fornavigi, kiam ili alproksimiĝas al ĝi je certa distanco. Se ili estas tien pelitaj de mara vento, la vento kaj la fluoj pereigas ilin, kaj se ili troviĝas tie, kiam blovas la eltera vento, kiu povus favorigi ilian foriron, la alteco de la monto haltigas ĝin, kaj kreas kalmon, kiu lasas la fluon agi, kaj forportas ilin al la bordo, kie ili rompiĝas same kiel nia ŝipo rompiĝis. Kiel pinto de malfeliĉo, ne eblas atingi la supron de la monto nek saviĝi tra iu loko.

Ni restis sur la bordo kiel homoj, kiuj perdis sian racion, kaj ni atendis la morton tagon post tago. Unue, ni egale dispartigis nian provianton; tiel ĉiu pli aŭ malpli longe vivis ol la aliaj, laŭ sia temperamento kaj laŭ la uzado, kiun li faris per siaj provizoj...

Ŝeherezad ĉesis paroli vidante, ke la tago komencis aperi. La postan tagon, ŝi tiel daŭrigis la rakonton pri la sesa vojaĝo de Sindbad.

## 86-a nokto

– Tiuj, kiuj la unuaj mortis, daŭrigis Sindbad, estis enterigitaj de la aliaj; rilate min, mi funebre honoris ĉiujn miajn kunulojn, kaj

oni ne devas miri pri tio; ĉar krom tio, ke mi pli bone ol ili ŝparis mian provianton, kiu venis al mi el la dispartigo, mi havis aliajn proprajn, pri kiuj mi atentis ne paroli al miaj kamaradoj. Tamen, kiam mi enterigis la lastan, restis al mi tiom malmulte da nutraĵo, ke mi taksis, ke mi ne kapablos tre longe elteni, tial mi mem fosis mian tombon, decidinte ĵeti min en ĝin, ĉar neniu plu vivis por enterigi min. Mi konfesos al vi, ke dum mi zorgis pri tiu tasko, mi ne kapablis malhelpi min pripensi, ke mi mem estas la kaŭzo de mia propra perdo, kaj penti, ĉar mi eniris en tiun lastan vojaĝon. Mi eĉ ne kontentiĝis pri tiuj pensoj, mi frapis min kun furiozo, sangigis miajn manojn per la dentoj kaj malmulte mankis, por ke mi rapidigu mian morton.

Sed Dio plian fojon kompatis min kaj inspiris al mi la ideon iri ĝis la rivero, kiu malaperis sub la volbo de la groto. Tie, ekzameninte la riveron kun multe da atento, mi diris en mi mem :

– Tiu rivero, kiu tiel kaŝiĝas sub la tero nepre devas eliri tra iu loko; konstruante floson kaj lasante min drivi sur ĝi laŭ la fluo de la akvo, mi atingos loĝatan lokon, aŭ mi pereos : se mi pereos, mi nur ŝanĝos mian tipon de morto; se kontraŭe mi eliras el tiu pereiga loko, mi ne nur evitos la tristan sorton de miaj kamaradoj, mi eble trovos novan okazon riĉiĝi. Kiu scias, ĉu riĉaĵo ne atendas min ĉe la elirejo de tiu terura kaptilo, por kompensi min kun interezo je mia ŝiprompiĝo ?

Post tiu pripensado, mi ne hezitis labori super la flosa; mi preparis ĝin el bonaj lignaj pecoj kaj el dikaj kabloj, ĉar mi havis sufiĉe da ili por elekti; mi tiom forte ligis ilin, ke mi faris el ili sufiĉe firman navigilon. Kiam mi finis ĝin, mi ŝarĝis ĝin per kelkaj pakoj kun rubenoj, smeraldoj, griza ambro, roka kristalo kaj valoraj ŝtofoj. Kiam mi stakigis ĉiujn tiujn aferojn en ekvilibro, kaj firme liginte ilin, mi grimpis sur la floson kun du remiletoj, kiujn mi ne forgesis fabriki, kaj lasante min drivi laŭ la fluo de la rivero, mi konfidis min al la volo de Dio.

Tuj kiam mi troviĝis sub la volbo, mi ne plu vidis la lumon, kaj la fluo de la rivero forportis min kaj mi ne povis rimarki kien ĝi forportas min. Mi flosis dum kelkaj tagoj en tiu obskuro, neniam vidante la plej etan lumradion. Iun fojon, mi trafis tiom malaltan volbon, ke ĝi preskaŭ vundis min ĉe la kapo, kio instigis min tre atenti por eviti tian danĝeron. Dume, mi manĝis la provianton, kiu restis al mi, ne pli ol mi bezonis por nature subteni mian vivon. Sed kiom ajn mi ekonomie vivis, mi atingis la finon de mia provianto. Tiam, ne kapablanta malhelpi tion, dolĉa dormo ektrafis miajn sensojn. Mi ne povas diri al vi, ĉu mi longe dormis; sed vekigante mi vidis min kun surprizo en iu vasta kamparo, apud iu rivero, kie mia flosa estis ligita kaj meze de granda nombro da Nigruloj. Mi leviĝis, tuj kiam mi ekvidis ilin kaj mi salutis ilin. Ili alparolis min, sed mi ne komprenis ilian lingvon.

En tiu momento, mi sentis min tiom ĝojigita, ke mi ne sciis, ĉu mi devas kredi min vekiginta. Ĉar mi estis konvinkita, ke mi ne dormas mi ekkriis kaj recitis tiujn arabajn versojn:

*Alvoku la Tut-potencon, ĝi venos helpe al ci: ci ne bezonas zorgi pri io alia. Fermu la okulon, kaj dum ci dormos, Dio ŝanĝos cian malbonan fortunon al bona.*

Unu el tiuj Nigruloj, kiu komprenis la araban, aŭdinte min tiel paroli, alproksimiĝis kaj ekparolis:

– Mia frato, li diris al mi, ne miru vidi nin. Ni loĝas en la kamparo, kiun vi vidas, kaj ni venis hodiaŭ por akvumi niajn agrojn per la akvo de tiu rivero, kiu eliras el la najbara monto, disfluigante ĝin per etaj kanaloj. Ni rimarkis, ke la akvo alportas ion, ni tuj rapide alkuris por vidi kio estas tio, kaj ni trovis, ke estas ĉi tiu floso; tuj unu el ni naĝe impetis kaj revenis kun ĝi. Ni haltigis ĝin kaj ligis kiel vi vidas kaj ni atendis vian vekigon. Ni petegas vin rakonti al ni vian historion, kiu devas esti tre eksterordinara. Diru al ni kiel vi aŭdacis iri sur tiu akvo, kaj de kie vi venas.

Mi respondis al ili, ke ili unue donu al mi ion por manĝi, kaj ke poste mi kontentigos ilian scivolemon:

Ili prezentis al mi plurajn specojn de manĝaĵoj, kaj kiam mi kontentigis mian malsaton, mi fidele raportis al ili pri ĉio, kio okazis al mi; tion ili aŭskultis kun miro. Tuj kiam mi finis mian paroladon:

– Jen, ili diris al mi tra la buŝo de la interpretanto, kiu klarigis al ili tion, kion mi ĵus diris, jen historio el la plej strangaj. Necesas, ke vi mem iru por informi la reĝon: la afero estas tro eksterordinara, por ke raportu ĝin iu alia ol tiu, al kiu ĝi okazis.

Mi respondis, ke mi estas preta fari tion, kion ili volas.

La Nigruloj tuj sendis iun por reveni kun ĉevalo, kiun oni venigis malmulte da tempo poste. Ili ekrajdigis min kaj dum parto paŝis antaŭ mi por montri al mi la vojon, la aliaj, kiuj estis la pli fortikaj, ŝarĝis sur siajn ŝultrojn la flosan tian, kia ĝi estis, kun la pakoj, kaj ili komencis sekvi min...

Ŝeherezad ĉe tiuj paroloj devis halti, ĉar la tago ekaperis. Ĉe la fino de la posta nokto, ŝi retrovis la fadenon de sia rakonto, kaj tiel ekparolis:

## 87-a nokto

– Ni ĉiuj kune paŝis, daŭrigis Sindbad, ĝis la urbo Serendib<sup>19</sup>, ĉar ja sur tiu insulo mi troviĝis. La Nigruloj prezentis min al sia reĝo. Mi alproksimiĝis al lia trono, kie li sidis, kaj salutis lin kiel oni kutimas saluti la reĝojn de Indioj, tio estas, ke mi kliniĝis ĉe liaj piedoj kaj kisis la teron. Tiu princo restarigis min kaj akceptante min per tre afabla mieno, li venigis min kaj sidigis min apud si. Li unue demandis min kiel mi nomiĝas: respondinte, ke mi nomiĝas Sindbad, kromnomita la maristo pro pluraj vojaĝoj, kiujn mi efektivigis surmare, mi aldonis, ke mi estas civitano de la urbo Bagdado.

<sup>19</sup> Serendib estas Cejlono / Sri Lanka.

– Sed, li reekparolis, kiel vi troviĝas en miaj Ŝtatoj, kaj per kiu vojo vi atingis ilin?

Mi kaŝis nenion al la reĝo kaj mi faris al li la saman rakonton, kiun vi ĵus aŭdis, kaj li estis tiom surprizita kaj ravita, ke li komandis, ke oni skribu mian aventuron per oraj literoj, por ke oni konservu ĝin en la arĥivoj de lia reĝejo. Oni poste alportis la floson kaj oni malfermis la pakojn en lia ĉeesto. Li admiris la kvanton da aloa ligno kaj da griza ambro, sed ĉefe la rubenojn kaj la smeraldojn, ĉar li ne havis en sia trezoro tiajn, kiuj kapablus rivali kun ili.

Rimarkante, ke li rigardas miajn juvelojn kun plezuro, kaj ke li ekzamenas la plej belajn unu post la aliaj, mi kliniĝis kaj aŭdacis diri al li:

– Senjoro, mia persono estas ne nur je la servo de Via Moŝto, la ŝarĝo de la floso same apartenas al vi, kaj mi petegas vin disponi pri ĝi, kiel pri havaĵo, kiu apartenas al vi.

Li diris al mi ridante:

– Sindbad, mi tre atentis plej ete ne deziri tion, nek forpreni de vi ion, kion Dio donacis al vi. Ĉar mi tute ne volas malpliigi viajn riĉaĵojn, mi male pretendas pliigi ilin, kaj mi ne volas, ke vi eliru el miaj Ŝtatoj ne forportante kun vi pruvojn pri mia malavareco.

Mi respondis al tiu paroloj nur esprimante dezirojn por la sukceso de la princo kaj laŭdante lian bonecon kaj malavarecon. Li komisiis al iu el siaj oficistoj zorgi pri mi, kaj donigis al mi servistojn por servi min liakoste. Tiu oficisto fidele respektis la ordonojn de sia mastro kaj li transportigis en la loĝejon, kien li kondukis min, ĉiujn pakojn, per kiuj la floso estis ŝarĝita.

Mi ĉiutage je certaj horoj, iris en la kortegon de la reĝo kaj mi uzis la ceteron de la tempo por vidi la urbon kaj kion plej indis mian scivolemon.

La insulo Serendib situas precize sub la ekvatora linio, pro tio, la tagoj kaj la noktoj ĉiam daŭras dekdu horojn, kaj ĝi ampleksas dudek parasanĝojn<sup>20</sup> en longeco kaj same en larĝeco. La ĉefa urbo situas ĉe la ekstremo de bela valo fermita per monto, kiu staras meze de la insulo, kaj kiu verŝajne estas la plej alta en la mondo. Efektive, oni ekvidas ĝin el la maro jam de tri tagoj da navigado. Oni tie trovas rubenojn, plurajn specojn de mineraloj, kaj ĉiuj rokoj estas, en sia plimulto, el smirgo, kiu estas metala ŝtono, kiun oni uzas por tajli la juvelojn. Oni tie vidas ĉiujn speciojn de raraj plantoj, ĉefe la cedro kaj la kokosarbo. Oni ankaŭ plukas la perlojn laŭlonge de ties bordoj kaj ĉe la enfluejoj de la riveroj, kaj kelkaj el ties valoj provizas diamanton. Mi ankaŭ faris pro religia fido, vojaĝon al la monto en la lokon, kie Adamo estis ekzilita, post kiam oni forpelis lin el la tera paradizo, kaj mi havis la scivolemon grimpi ĝis la supro.

Kiam mi revenis en la urbon mi petegis la reĝon permesi al mi retroiri en mian landon, pri kio li tre afable kaj tre honorinde konsentis. Li devigis min akcepti riĉan donacon, kiun li ĉerpis el sia trezoro, kaj kiam mi iris por adiaŭi lin, li enmanigis al mi alian trezoron

<sup>20</sup> Parasano estas malnova persia unuo, kiu valoras 5.250 metrojn.

ankoraŭ pli konsiderindan, kaj samtempe leteron por la Komandoro de la kredantoj<sup>21</sup>, nia suverena Senjoro, dirante al mi:

– Mi petas vin transdoni miaparte tiun donacon al la kalifo Harun-al-Raŝido, kaj certigi al li mian amikecon.

Mi prenis la donacon kaj la leteron kun respekto, promesante al Lia Moŝto precize plenumi la ordonojn, per kiuj li honoras kaj komisias min. Antaŭ ol mi surŝipiĝis, tu princo venigis la kapitanon kaj la komercistojn, kiuj devis vojaĝi kun mi, kaj ordonis al ili havi rilate min ĉiujn eblajn komplezojn.

La letero de la reĝo de Serendib estis skribita sur la haŭto de iu certa animalo tre valora kaŭze de ĝia malofteco, kaj kies koloro proksimas al la flava. La literoj de tiu letero estis blukoloraj, kaj jen kion ĝi entenis en la india lingvo:

*La reĝo de Indioj, antaŭ kiu paŝas mil elefantoj, kiu loĝas en palaco, kies tegmento brilas per la brilo de centmil rubenoj, kaj kiu posedas en sia trezoro dudek mil kronojn riĉigitajn per diamantoj, al la kalifo Harun-al-Raŝido.*

*Kvankam la donaco, kiun ni sendas al vi estas ne tre konsiderinda, tamen nepre ricevu ĝin kiel frato kaj amiko, konsiderante la amikecon, kiun ni konservas por vi en nia koro, kaj pri kiu ni estas ravita atesti. Ni petas vin havi la saman en la via, ĉar ni kredas meriti ĝin pro tio, ke ni estas el rango simila al tiu, kiun vi havas. Ni petegas vin pri tio kiel frato. Adiaŭ.*

La donaco unue konsistis el vazo el unu rubeno, kavigita kaj prilaborita kiel kaliko, unu duonan futon en grandeco kaj unu fingron en dikeco, plena je tre rondaj perloj kaj ĉiuj kun pezo de duondraĥmo<sup>22</sup>; due, el serpenta haŭto, kiu havas skvamojn grandajn kiel kutima ora monero, kaj kies eco estas protekti kontraŭ malsano tiujn, kiuj kuŝas sur ĝi; trie, el kvindek mil draĥmoj de la plej fajna aloa ligno, kun tridek grajnoj da kamforo ĉiu granda kiel pistako, kaj fine, la tuto estis akompanata de sklavino de rava beleco, kaj kies vestaĵoj estis kovritaj per juveloj.

La ŝipo ekvelis kaj post longa kaj tre feliĉa navigado, ni albordiĝis en Basoran, de kie mi atingis Bagdadon. La unua ago, kiun mi faris post mia alveno estis plenumi la mision, kiun oni komisiis al mi...

Ŝeherazad ne pli diris, ĉar la tago aperis. La postan tagon, ŝi tiel reekparolis:

## 88-a nokto

– Mi prenis la leteron de la reĝo de Serendib, daŭrigis Sindbad, kaj mi iris por prezenti min ĉe la pordo de la Komandoro de la kredantoj, sekvata de la bela sklavino kaj de miaj samfamilianoj, kiuj portis la donacojn, per kiuj mi estis ŝarĝita. Mi diris tion, kio venigis min

<sup>21</sup> Tio estas la kalifo, posteulo de la Profeto, ĉekape de la komunumo de la kredantoj.

<sup>22</sup> Draĥmo: pezunujo en la antikvaj tempoj, valoranta 3,24 gramojn.

kaj oni tuj kondukis min antaŭ la trono de la kalifo. Mi riverencis lin kliniĝante antaŭ li kaj farinte al li tre mallongan paroladon, mi prezentis al li la leteron kaj la donacon. Kiam li finlegis tion, kion sendas al li la reĝo de Serendib, li demandis min, ĉu vere estas, ke tiu princo estas tiom potenca kaj tiom riĉa kiel diras lia letero. Mi duan fojon kliniĝis, kaj restariĝinte:

– Komandoro de la kredantoj, mi respondis, mi povas certigi al Via Moŝto, ke li ne troigas siajn riĉaĵojn nek sian potencon; mi estas ties atestanto. Nenio estas pli kapabla naski admiron ol la pompo de lia palaco. Kiam tiu princo volas aperi antaŭ publiko, oni muntas por li sur elefanto tronon, sur kiun li sidiĝas, kaj li iras inter du vicoj konsistantaj el siaj ministroj, el siaj favoratoj kaj el aliaj personoj el lia kortego. Antaŭ li, sur la sama elefanto, oficisto tenas oran lancon en la mano, kaj malantaŭ la trono, alia staranta, portas oran kronon, supre de kiu oni vidas smeraldon longan proksimume je duonfuto kaj dikan je unu colo. Lin antaŭas gvardio je mil homoj vestitaj per ora kaj silka drapo kaj rajdantaj elefantojn riĉe kovritaj per ĉabrako. Dum la reĝo iras, la oficisto, kiu troviĝas antaŭ li sur la sama elefanto laŭte krias de tempo al tempo:

– *Jen la granda monarĥo, la potenca kaj timinda sultano de Indioj, kies palaco estas kovrita per cent mil rubenoj, kaj kiu posedas dudek mil kronojn el diamantoj! Jen la kronigita monarĥo pli granda ol iam estis la granda Solima<sup>23</sup> kaj la granda Mihraĝo<sup>24</sup>*

Tuj kiam tiu eldiris tiujn parolojn, la oficisto, kiu staras malantaŭ la trono siavice krias:

– *Tiu tiom granda kaj tiom potenca monarĥo, devas morti, devas morti, devas morti.*

La antaŭa oficisto rediras tion kaj poste krias:

– *Laŭdo al tiu, kiu vivas kaj ne mortas.*

Cetere, la reĝo de Serendib estas tiom justa, ke ne ekzistas juĝistoj en lia ĉefurbo, nek en la cetero de liaj Ŝtatoj: liaj popoloj ne bezonas ilin. Ili scias kaj mem skrupule respektas la justicon, kaj ili neniam deflankiĝas de sia devo. Tial la tribunaloj kaj la juĝistoj estas nenecesaj en ilia lando.

La kalifo estis tre kontenta pro miaj paroloj.

– La saĝeco de tiu reĝo, li diris, tralikas en lia letero kaj post tio, kion vi ĵus diris al mi, necesas konfesi, ke lia saĝeco indas je liaj popoloj, kaj liaj popoloj indas je ĝi.

Ĉe tiuj vortoj, li fordankis min kaj forsendis kun riĉa donaco...

Sindbad finis sian rakonton en tiu momento, kaj liaj aŭskultantoj retiriĝis; sed Hindbad antaŭe ricevis cent zekinojn. Ili denove revenis la postan tagon en la domon de Sindbad, kiu rakontis al ili sian sepan kaj lastan vojaĝon per tiuj paroloj:

<sup>23</sup> Tio estas Salomono;

<sup>24</sup> Reĝo de Indioj fama por sia potenco kaj saĝeco.

## Sepa kaj lasta vojaĝo de Sindbad la maristo

Revene de mia sesa vojaĝo, mi tute forlasis la ideon iam entrepreni aliajn. Ĉar mi nun atingis aĝon, kiu postulas nur ripozon, mi firme promesis al mi ne plu endanĝerigi mian vivon, kion mi tiom ofte faris. Tiel mi revis nur kiel milde pasigi la ceteron de mia vivo. Iun tagon, kiam mi regalis kelkajn amikojn, unu el miaj servistoj venis por informi min, ke iu oficisto de la kalifo volas vidi min. Mi foriris de ĉe la tablo kaj iris al li.

– La kalifo, li diris, komisiis min por diri al vi, ke li volas paroli kun vi.

Mi sekvis ĝis la palaco la oficiston, kiu prezentis min al tiu princo, kiun mi salutis sterniĝante ĉe liaj piedoj.

– Sindbad, li diris al mi, mi bezonas vin: necesas, ke vi faru al mi komplezon, ke vi iru por porti mian respondon kaj miajn donacojn al la reĝo de Serendib; estas juste, ke mi kontraŭvalu la ĝentilaĵon, kiun li okazigis al mi.

La ordono de la kalifo estis por mi fulmobato.

– Komandoro de la kredantoj, mi diris al li, mi pretas fari ĉion, kion ordonos Via Moŝto; sed mi tre humile petegas vin konscii, ke min malkuraĝigas la nekredeblaj lacoj, kiujn mi trasuferis. Mi eĉ promesis al mi, ke mi neniam eliros el Bagdado.

Post tio, mi kaptis la okazon detale kaj longe rakonti al li ĉiujn miajn aventurojn, kiujn li pacience aŭskultis ĝis la fino. Tuj kiam mi ĉesis paroli:

– Mi konfesas, li diris, ke jen tre eksterordinaraj eventoj; sed tamen ili ne devas malhelpi vin fari pro amo al mi, la vojaĝon, kiun mi proponos al vi. Temas nur pri irado al la insulo Serendib por plenumi la mision, kiun mi konfidis al vi. Post tio, vi estos libera reveni. Sed necesas iri tien: ĉar vi bone komprenas, ke estus nedece kaj nedigne miaflanke, ŝuldi ion al la reĝo de tiu insulo.

Ĉar mi vidis, ke la kalifo nepre postulas tion de mi, mi montris al li, ke mi estas preta obei. Li tre ĝojis pro tio kaj li donacis al mi mil zekinojn por miaj vojaĝaj elspezoj.

Mi preparis min por tiu vojaĝo en malmulte da tagoj, kaj tuj kiam oni liveris al mi la donacojn de la kalifo kun letero el lia propra mano, mi foriris kaj direktis min sur la vojon al Basora, kie mi surŝipiĝis. Mia navigado estis tre feliĉa: mi atingis la insulon Serendib. Tie mi klarigis al la ministroj de la reĝo tion, per kio oni komisiis min, kaj petis ilin tuj havigi al mi aŭdiencon. Ili nepre faris tion. Oni kondukis min al la palaco kun honoro. Mi tie salutis la reĝon kaj kliniĝis laŭ la kutimo.

Tiu princo tuj rekonis min kaj montris al mi tute specifan ĝojon revidi min.

– Ha, Sindbad! li diris al mi, estu bonvena! Mi ĵuras al vi, ke mi tre ofte pensis pri vi post via foriro. Mi benas ĉi tiun tagon, ĉar plian fojon ni vidas unu la alian. Mi salutis lin, kaj dankinte lin pro la

favoro, kiun li havas al mi, mi prezentis al li la leteron kaj la donacon de la kalifo, kiujn li ricevis kun ĉiuj pruvoj de granda feliĉo.

La kalifo sendis al li kompletan ornamaĵon por la trono el ora drapo, kun valoro de mil zekinojn, kvindek robojn el tre riĉa ŝtofo, cent aliajn el blanka tolo, la plej fajna el Kairo, el Suez, el Kufa<sup>25</sup> kaj el Aleksandrio; alian ornamaĵon de trono de karmezina koloro, kaj ankoraŭ alian de alia tipo; gagatan vazon pli larĝan ol profundan, dikan je unu fingro kaj kun duonfuta aperturo, kies fundo reprezentas skulptitan viron kun genuo altere, kiu tenas arkon kun sago, pretan pafi kontraŭ leono; li fine sendis al li riĉan tablon, pri kiu oni kredas, laŭtradicie, ke ĝi venas de la granda Salomono. La letero de la kalifo tiamaniere tekstis:

*Saluton, je la nomo de la suvereno gvidanto de la rekta vojo, al la potenco kaj feliĉa sultano, nome de Abdallah Harun-al-Raŝido, kiun Dio postenigis en la lokon de honoro<sup>26</sup> post liaj prauloj de fama rememoro.*

*Ni kun ĝojo ricevis vian leteron kaj sendas tiun ĉi, fontantan el la konsilio de nia kortego, la ĝardeno de la superaj mensoj. Ni esperas, ke legante ĝin, vi ekkonos nian bonan intencon, kaj ke ĝi estos al vi agrabla. Adiaŭ.*

La reĝo de Serendib spertis grandan plezuron vidante, ke la kalifo spegulas la amikecon, kiun li montris al li. Iomete post tiu aŭdienco, mi petis mian forpermeson, kiun mi ricevis kun multe da peno. Mi fine ricevis ĝin, kaj la reĝo fordankante min, faris al mi tre gravan donacon. Mi tuj resurŝipiĝis cele al reveno en Bagdadon; sed mi ne havis la feliĉon atingi ĝin kiel mi esperis kaj Dio alimaniere disponis pri mi.

Tri aŭ kvar tagojn post nia forveturo, atakis nin korsaroj, kiuj tiom pli facile kaperis nian ŝipon, ke ni tute ne kapablis defendi nin. Kelkaj personoj el la ŝipanaro volis rezisti, sed tio kostis al ili la vivon; rilate min kaj ĉiujn tiujn, kiuj havis la saĝecon ne kontraŭi la intencon de la korsaroj, oni sklavigis nin...

La taglumo, kiu aperis devigis Ŝeherezad-on silenti. La postan tagon, ŝi tiel reekparolis.

## 89-a nokto

– Senjoro, ŝi diris al la Sultano de Indioj, Sindbad daŭre rakontante la aventurojn pri sia lasta vojaĝo:

– La korsaroj senvestigis nin ĉiujn, li daŭrigis, kaj kiam ili donis al ni trivitajn vestojn anstataŭ la niaj, ili forportigis nin en tre foran grandan insulon, kie ili vendis nin.

<sup>25</sup> Arabia urbo proksima al Bagdado (je 50 leŭgoj), sur la okcidenta brako de Eŭfrato).

<sup>26</sup> Iaspeca paradizo, privilegiita loko, destinita al la famaj homoj post ilia morto.



Mi trafis en la manojn de riĉa komercisto, kiu tuj kiam li aĉetis min, kondukis min en sian hejmon, kie li bone manĝigis min kaj bone vestis min kiel sklavon. Kelkajn tagojn poste, ĉar li ankoraŭ ne bone informiĝis, kiu mi estas, li demandis min, ĉu mi scias iun metion. Mi respondis, ne pli bone informante lin pri mi, ke mi ne estas manlaboristo, sed profesia komercisto, kaj ke la korsaroj, kiuj vendis min forprenis de mi ĉion, kion mi posedis.

– Sed diru al mi, li reekparolis, ĉu vi ne kapablus pafi el arko?

Mi respondis, ke tio estas unu el la ekzercoj de mia junaĝo, kaj mi ne forgesis ĝin ekde tiu tempo. Tiam li donis al mi arkon kaj sagojn, kaj instalinte min malantaŭ si sur elefanton, li kondukis min en arbaron foran de la urbo je kelkaj horoj da irado, kaj kies areo estas tre vasta. Ni profunde penetris en ĝin, kaj kiam li taksis oportuna la momenton por halti, li desuprigis min. Poste, montrante al mi altan arbon:

– Grimpu sur tiun arbon, li diris al mi kaj pafu kontraŭ la elefantoj, kiujn vi vidis sub vi: ĉar ili estas en tre granda nombro en ĉi tiu arbaro. Se falas unu el ili, venu por informi min.

Dirinte tion, li lasis nutraĵon al mi, reekiris laŭ la vojo al la urbo kaj mi embuske restis sur la arbo dum la tuta nokto.

Dum tiu tuta tempo, mi ekvidis neniun el ili, sed la postan tagon, tuj kiam la suno leviĝis, mi vidis ekaperi grandan nombron da ili. Mi pafis kontraŭ ili plurajn sagojn, kaj fine unu falis surteren. La aliaj tuj retiriĝis kaj lasis al mi la eblon averti mian mastron pri la ĉasaĵo, kiun mi ĵus sukcesis. Favore al tiu novaĵo, li regalis min per bona manĝaĵo, laŭdis mian lertecon kaj tre gratulis min. Poste ni kune iris al la arbaro, kie ni fosis truon, en kiun ni enterigis la elefanton, kiun mi mortigis. Mia mastro intencis reveni, kiam la animalo forputriĝos kaj forpreni la dentegojn por komerci per ili.

Mi daŭrigis tiun ĉasadon dum du monatoj, kaj ne pasis tago, kiam mi ne mortigis unu elefanton. Mi embuskiĝis ne ĉiam sur la sama arbo, mi lokis min ĉu sur unu, ĉu sur alia. Iun matenon dum mi atendis la alvenon de la elefantoj, mi konstatis kun granda miro, ke anstataŭ pasi antaŭ mi trairante la arbaron kiel kutime, ili haltis kaj venis al mi kun terura bruo kaj ili estis tiom multnombraj, ke la grundo estis kovrita per ili kaj tremis sub iliaj paŝoj. Ili alproksimiĝis al la arbo, sur kiun mi grimpis kaj ĉiuj ĉirkaŭis ĝin, kun etendita rostro kaj okuloj fiksitaj al mi. Ĉe tiu mirinda spektaklo, mi restis senmova kaj trafita de tia timo, ke mia arko kaj miaj sagoj forfalis el miaj manoj.

Mi ne vane timis. Rigardinte min dum kelka tempo, unu el la plej dikaj elefantoj kaptis la malsupran parton de la trunko per sia rostro, faris tiom potencon strebon, ke ĝi elradikigis la arbon kaj renversis ĝin sur la grundon. Mi falis kun la arbo; sed la animalo plukis min per sia rostro kaj metis min sur sian dorson, kie mi sidiĝis pli mortinta ol viva, kaj kun la sagingo ligita ĉirkaŭ miaj ŝultroj. Ĝi poste metis sin ĉekape de ĉiuj aliaj, kiuj ope sekvis ĝin, kaj ĝi portis min ĝis loko, kie metinte min sur la teron, ĝi retiriĝis kun ĉiuj, kiuj akompanis ĝin. Imagu, se eblas, mian pozicion: mi pli kredis dormi ol vigli. Fine, sterniĝinte kelkan tempon surloke, ne plu vidante ele-

fantojn, mi ekstaris kaj rimarkis, ke mi troviĝas sur monteto sufiĉe longa kaj sufiĉe larĝa, tute kovrita per ostoj kaj elefantaj dentegoj. Mi konfesas al vi, ke tiu vidaĵo naskis en mi multajn pripensojn. Mi admiris la instinkton de tiuj animaloj. Mi ne dubis, ke ĉi tie troviĝas ilia tombejo, kaj ke ili intence alportis min ĉi tien por montri ĝin al mi, por ke mi ĉesu persekuti ilin, ĉar mi tion faris nur por akiri iliajn dentegojn. Mi ne haltis sur la monteto, mi direktis miajn paŝojn al la urbo; kaj paŝinte dum unu tago kaj unu nokto, mi alvenis ĉe mia mastro. Mi renkontis neniun elefanton survoje, kio komprenigis al mi, ke ili foriris pli profunden en la arbaron por lasi al mi la eblon senobstakle atingi la monteton.

Tuj kiam mia mastro ekvidis min:

– Ha! kompatinda Sindbad! li diris, mi estis tre ĉagrenita por scii kio okazis al ci. Mi iris al la arbaro, mi tie trovis arbon antaŭ nelonge elradikigitan, arkon kaj sagojn surtere, kaj post vana tra-serĉado, mi malesperis iam revidi cin. Rakontu al mi, mi petas, kio okazis al ci. Kiel ci feliĉe daŭre estas viva?

Mi kontentigis lian scivolemon, kaj la postan tagon, ni ambaŭ iris al la monteto, kie li agnoskis kun profunda ĝojo la veron de tio, kion mi diris al li. Ni ŝarĝis la elefanton, sur kiu ni venis per ĉiuj dentoj, kiujn ĝi kapablis porti, kaj kiam ni revenis:

– Mia frato (ĉar mi plu volas trakti vin kiel sklavon, post la plezuro, kiun vi ĵus okazigis al mi danke al malkovro, kiu riĉigos min), Dio plenŝtopu vian vivon per ĉiuj eblaj riĉaĵoj kaj feliĉaĵoj! Mi deklaras antaŭ li, ke mi liberigas vin. Mi kaŝis al vi tion, kion vi tuj aŭdos: la elefantoj de nia arbaro mortigas ĉiun jaron senfinon da sklavoj, kiujn ni sendas por kolekti eburon. Kiajn ajn konsilojn ni donis al ili, ili frue aŭ malfrue perdas la vivon pro la ruzo de tiuj animaloj. Dio liberigis vin el ilia furiozo kaj nur al vi okazigis tiun komplezon. Tio estas signo, ke li amas vin, kaj ke li bezonas vin en la mondo pro la bono, kiun vi devas tie efektiviĝi. Vi donas al mi nekredoblan avantaĝon: ni kapablis ĝis nun havi eburon nur riskante la vivon de niaj sklavoj; kaj jen nia urbo riĉigita danke al vi. Ne kredu, ke mi pretendas, ke mi sufiĉe rekompencis vin per la liberigo, kiun vi ĵus ricevis; mi volas aldoni al tiu donaco valoregajn riĉaĵojn. Mi povus konsili al la tuta urbo konsistigi vian riĉaĵon, sed tio estas gloro, kiun mi volas havi por mi sola.

Ĉe tiuj afablaj paroloj, mi respondis:

– Mastro, Dio konservu vin! La libereco, kiun vi donas al mi sufiĉas por kvitigi vin kun mi, kaj kiel sola rekompenco por la helpo, kiun mi havis la feliĉon okazigi al vi kaj al via urbo, mi petas de vi nur la permeson retroiri en mian landon.

– Nu! li respondis, la musono baldaŭ venigos al ni ŝipojn, kiuj alvenos por ŝarĝi eburon. Mi tiam forsendos vin kaj donos al vi ion por konduki vin hejmen.

Mi denove dankis lin pro la libereco, kiun li ĵus donis al mi kaj pro la favoraj intencoj, kiujn li havas por mi. Mi restis en lia domo por atendi la musonon, kaj dum tiu tempo ni faris tiom da vojaĝoj al la monteto, ke ni plenigis liajn staplojn per eburo. Ĉiuj negocistoj de

la urbo, kiuj komercas per ĝi faris la samon: ĉar tio restis ne longe kaŝita de ili.

Ĉe tiuj paroloj, Ŝeherezad ekvidante la komencon de la tago, ĉesis paroli. Ŝi denove ekrakontis la postan nokton, kaj diris al la sultano de Indioj:

## 90-a nokto

– Senjoro, Sindbad daŭrigis la rakonton pri sia sepa vojaĝo:

– La ŝipoj, li diris, fine alvenis kaj mia mastro mem elektinte tiun, sur kiun mi devos surŝipiĝi, ŝarĝis ĝin per eburo duone mia-profite. Li ne forgesis abunde provizi ĝin per manĝaĵoj por mia retroira vojaĝo, kaj plie, li devigis min akcepti multekostajn donacojn, kuriozaĵojn de tiu lando. Post kiam mi dankis lin tiom multe kiom eblis al mi tion fari pro ĉiuj bonfaroj, kiujn mi ricevis de li, mi surŝipiĝis. Ni ekvelis kaj, ĉar la aventuro, kiu ebligis al mi reakiri liberecon, estis tre eksterordinara, mi senĉese pensis pri ĝi.

Ni haltis en kelkaj insuloj por tie preni freŝajn nutraĵojn. Ĉar nia ŝipo fornavigis el haveno sur firma grundo de Indioj, ni iris tien al-bordiĝi, kaj tie, por eviti la marajn danĝerojn ĝis Basora, mi malŝarĝigis la eburon, kiu apartenis al mi, kaj decidis daŭrigi la vojaĝon surtere. Mi ricevis kontraŭ mia eburo grandan monan sumon; per ĝi mi aĉetis multajn rarajn objektojn por fari el ili donacojn, kaj kiam mia afero estis preta, mi aliĝis al granda karavano de komercistoj. Mi longe restis survoje kaj multe suferis; sed mi pacience suferis pensante, ke mi plu devas timi nek la tempestojn, nek la korsarojn, nek la serpentojn, nek ĉiujn aliajn danĝerojn, kiujn mi jam trasuferis.

Ĉiuj tiuj lacoj fine ĉesis: mi feliĉe atingis Bagdadon. Mi unue iris por prezenti min al la kalifo, kaj raporti pri mia misio. Tiu princo diris al mi, ke la longa daŭro de mia vojaĝo estis por li kaŭzo de maltrankviliĝo; sed ke tamen, li ĉiam esperis, ke Dio ne forlasos min. Kiam mi sciigis al li la aventuron pri la elefantoj, li ŝajnis tre surprizita pro ĝi, kaj li rifuzus kredi tion, se mia sincereco ne estus konata de li. Li taksis tiun historion kaj la aliajn, kiujn mi rakontis al li, tiom strangaj, ke li komisiis al unu el siaj sekretarioj surpaperigi ilin per oraj literoj, por ke oni konservu ilin en lia trezorejo. Mi retiriĝis tre kontenta pro la honoro kaj la donacoj, kiujn li havigis al mi; poste mi tute dediĉis min al mia familio, al miaj parencoj kaj al miaj amikoj.

Tiamaniere Sindbad finis la rakonton pri sia sepa kaj lasta vojaĝo, kaj poste, adresante sin al Hindbad:

– Nu! mia amiko, li aldonis, ĉu vi iam aŭdis, ke iu tiom suferis kiom mi, aŭ ke iu mortemulo troviĝis en tiom ĝenaj malfacilaĵoj? Ĉu ne estas juste, ke post tiom da laboroj, mi ĝuu agrablan kaj trankvilan vivon?

Kiam li finis tiujn vortojn, Hindbad alproksimiĝis al li, kaj kisantere lian manon diris:

– Necesas konfesi, Senjoro, ke vi travivis terurajn danĝerojn;

miaj penoj estas neniel kompareblaj kun la viaj. Se ili afliktas min dum la tempo, kiam mi trasuferas ilin, mi konsolas min per la eta profito, kiun mi eltiras el ili. Vi meritas ne nur trankvilan vivon, vi ankoraŭ indas ĉiujn riĉaĵojn, kiujn vi posedas, ĉar vi faras el ili tiom bonan uzadon, kaj ĉar vi estas tiom malavara. Daŭrigu do vian vivon en ĝojo ĝis la horo de via morto.

Sindbad denove donacis al li cent zekinojn, kaj akceptis lin en la nombron de siaj amikoj, li diris al li forlasi la profesion de portisto kaj daŭre plu veni por manĝi kun li, li tiel havos la okazon rememori Sindbad-on la mariston dum sia tuta vivo.

Ŝherazad vidante, ke la tago ankoraŭ ne aperis, daŭre parolis kaj komencis alian rakonton.